

# EL POPOLA

中國報道

2 1982

# ĈINIO






# *Moroj de baj-oj*

Fotoj de QU WEIBO

En la okcidenta parto de Yunnan-provinco de Ĉinio estas la bela lago Erhai sur altebenaĵo. Sur ĝia okcidenta bordo majeste staras la monto Diancang, ĉe kies piedo estas aluvio loĝata de granda parto de la ĉinaj baj-oj.

La miliono da baj-oj havas sian tradicion kaj originalecon en kulturo kaj arto, kaj precipe en arkitekturo. Iliaj artisme konstruitaj domoj kun gravuritaj kaj pentritaj kolonoj kaj traboj ne nur havas supren levitajn tegmentrandojn, sed antaŭ estas ornamitaj per homfiguroj, birdoj kaj floroj gravuritaj sur lignaj fenestroj kaj pordoj. La baj-aj virinoj estas lertaj en brodado. Ili beligas siajn kaptukojn, vestojn kaj vivbezonaĵojn per brilaj brodaĵoj.



Loĝdomoj de  
baj-oj





Al fiŝado

Novaj ŝuoj



Baj-a knabino en brodado





Bele broditaj vestoj



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

La ĉina kaj japana teamoj en la  
Tria Mondpokala Virina Flugpilka  
Konkurso

### SUR LA DORSKOVRILO:

Knabino (Ĉinstila pentraĵo)  
de **SHAO FEI**

### KOLORAJ SERIOJ:

Moroj de baj-oj

La bela lago Songhua

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de  
E-istoj

(1) Meznokta suno ĉe Tromso,  
Norvegio

(2) Vintro en Alessandria

Freskoj en la palaco Yongle

Valoraj historiaj artaĵoj de Xi'an

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La Ĉina Virina Flugpilka Teamo  
gajnis la mondan ĉampionecon

“Amikoj de Esperanto” fondita en  
Ĉinio

Inaŭguro de “Amikoj de Esperanto” en Beijing . . . . .	2
Parolado ĉe la inaŭguro de “Amikoj de Esperanto” . . . . .	4
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	4,8
La Esperanto-movado en Ĉinio (1) . . . . .	5
NIA KULTIVEJO: Inter rumanaj esperantistoj . . . . .	7
Por la jubileo de Esperanto . . . . .	10
Tendenco de loĝantaro en Azio . . . . .	11
Ĉinio regas kreskon de sia loĝantaro . . . . .	13
Naskolimigo en Ĉinio . . . . .	15
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	16
La vojo de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo al la monda ĉampionecon . . . . .	17
Printempo ĉiam restu ĉe ni . . . . .	19
En la Beijing-a Magazeno . . . . .	21
VIDINDAJ LOKOJ: La bela kaj fekunda lago Songhua . . . . .	24
“Ornitologia doktoro” . . . . .	25
Por servi al la laborantaj geedzoj . . . . .	28
Neĝopluva nokto . . . . .	31
MIA VIVO: De imperiestra familiano al ordinara civitano . . . . .	33
5000 JAROJ DE ĈINIO: Antikvaj mitoj kaj legendoj . . . . .	35
KALEJDOSKOPO . . . . .	37
Plibonigo de la ekonomiaj rilatoj inter la sudo kaj la nordo estas la fluo de la epoko . . . . .	38
Picasso — fama pentristo de nia jarcento . . . . .	41
KURANTAĴ AFEROJ . . . . .	44
AMIKECO . . . . .	46
HISTORIAJ OBJEKTOJ: La palaco Yongle . . . . .	47

—◆—  
Ĝenerala distribuanto: Esperanta  
Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldo-  
naĵoj (GUOJI SHUDIAN)  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# INAŬGURO DE "AMIKOJ DE ESPERANTO" EN BEIJING

En la 6-a de decembro, nelonge antaŭ la 122-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof inaŭguriĝis la "Amikoj de Esperanto" en Beijing (Pekino). Tiu ĝojiga novaĵo montris plian progreson de la ĉina Esperantomovado en la lastaj jaroj.

La organizaĵon iniciatis la ĉinaj eminentuloj Chu Tunan, Hujucz, Bakin, Xia Yan, Xie Bingxin, Zhao Puchu, Ye Shengtao, Bai Shouyi, Zhu Jiusi kaj Ĵelezo.

Matene de tiu tago vico da personaŭtoj fluis al la Kultura Palaco de Laboruloj oriente de Tian'an-pordego. La inaŭguron ĉeestis pli ol 150 personoj, inkluzive de membroj de la Tutlanda Popola Kongreso, membroj de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, respondeculoj de la ŝtataj institucioj kaj municipaj institucioj de Beijing kaj diversrondaj personoj simpatiaj al la Esperantomovado. Kun ĝojo ili reciprokis salutojn, varme gratulante la naskiĝon de la organizaĵo. Inter la ĉeestantoj estis Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; Bakin, vicprezidanto de la Ĉina Literatura kaj Arta Federacio; Zhou Peiyuan, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa

Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Scienca-teknika Asocio; Kong Yuan, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj asista ĝenerala sekretario de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso; Zhang Youyu, vicprezidanto de la Ĉina Sociologia Akademio; Hu Sheng, fama historiisto kaj membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso; Liu Daosheng, sekretario de la Beijing-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio; Wang Zhongfang, vicministro de la Komisiono por Kultura Kontakto kun Fremdaj Landoj; Wang Duo, vicsekretario de la Komitato de Interna Mongolio de la Komunista Partio de Ĉinio; Zhu Jiabi, vicprezidanto de la Yunnan-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; famaj verkistoj Lou Shiyi kaj Duanmu Hongliang; famaj historiistoj Bai Shouyi kaj Zhou Gucheng; fama tradukisto Cao Jinghua; famaj pentristoj Liu Haisu, Dong Shouping kaj Zhang Leping; Yang Yunyu, vicministro de la Eduka Ministerio; Wang Weicai, vicdirektoro de la Ĉina Popola Banko; kaj aliaj respondeculoj de ĵurnalismaj departementoj kaj eldonejoj Jiang Chunfang, Liu Zunqi, Lu Yi, Zheng Senyu, Wu Wentao, Luo Jun, Chen Yuan, Jin Zhao kaj Wang Jihua. Al la kunveno sendis gratulan leteron nia samideanino Lin Li-

yun, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

Je la 9-a horo antaŭtagmeze, Cicio Mar, membro de la Sekretariato de la Ĉina Verkista Asocio kaj membro de la Konstanta Komitato de ĈEL deklaris la kunvenon malfermita. Antaŭ ĉio faris raporton Ĉ. Ĉen, ĝenerala sekretario de ĈEL. Li detale konigis al la ĉeestantoj la preparadon por la fondiĝo de "Amikoj de Esperanto". Li diris: "En la komenco de 1981 UEA sendis leteron al ĈEL, esperante ke ni fondos organizaĵon inter la ĉinaj parlamentanoj por subteni nian movadon. Ni opiniis, ke inter la ĉinaj eminentuloj ne mankas simpatiantoj por nia lingvo, sed ne ili ĉiuj estas membroj de la Tutlanda Popola Kongreso aŭ membroj de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, tial la organizaĵo povas larĝigi sian amplekson, t.e. krom tiaj membroj ĝi ampleksos ankaŭ influajn personojn el diversaj rondoj en la socio. La ideo estis aprobita de Chu Tunan, Hujucz, Bakin kaj aliaj kamaradoj. Tial en ilia nomo oni prezentis la proponon al la tuta lando kaj ricevis tujan aprobon de diversrondaj eminentuloj. Nun jam 90 personoj aliĝis al nia organizaĵo, inkluzive de pli ol 40 membroj de la Tut-



landa Popola Kongreso kaj la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.” Ĉ. Ĉen emfazis: “Ke en la granda lando Ĉinio tiel multe da eminentuloj diversrondaj simpatias al Esperanto kaj organiziĝas en ‘Amikoj de Esperanto’, tio sendube naskos grandan influon en- kaj eksterlande kaj antaŭenigos nian aferon.”

Fama verkisto Bakin faris varman parolon en la kunveno. Li diris: “Hodiaŭ tiel multaj honoraj gastoj ĉeestas nian inaŭguran kunvenon. Tio estas grava afero por la ĉina Esperanto-movado kaj ankaŭ por la internacia Esperanto-movado. Tio ankaŭ pruvas ke la Esperanto-movado akiris grandan disvolviĝon en nia lando. Mi estas profunde konvinkita ke la Esperanto-movado havas brilan estontecon.”

La kunvenon salutis ankaŭ Hu Sheng, Liu Daosheng, Wang Zhongfang, Ge Baoquan kaj aliaj veteranaj esperantistoj. Ili ĉiuj esprimis sian gratulon al la inaŭguro.

La kunveno unuanime elektis Chu Tunan kiel prezidanton de “Amikoj de Esperanto” kaj Ĉ. Ĉen kiel ĝian ĝeneralan sekretario.

Fine parolis Chu Tunan. Li diris, ke li neniam malesperigos la samideanojn kaj kune kun ili kontribuos al la disvolviĝo de Esperanto. La kunveno finiĝis per varmaj aplaŭdoj.

“Amikoj de Esperanto” vekis atenton de la ĉina ĵurnalista rondo. La novaĵo estis publikigita de novaĵ-agentejoj, ĵurnaloj kaj radioj, inkluzive de la ŝtataj Xinhua-a Novaĵ-agentejo kaj Ĉina Novaĵ-agentejo, la plej



*En la kunvenejo*

popularaj ĵurnaloj “Renmin Ribao” (Popola Ĵurnalo), “Guangming Ribao” (Lumo), “Gongren Ribao” (Laborista Ĵurnalo) kaj la anglalingva ĵurnalo “China Daily”, la ĉefurbaj ĵurnaloj “Beijing Ribao” (Beijing-a Ĵurnalo) kaj “Beijing Wanbao” (Beijing-a Vesperĵurnalo), kaj Radio Pekino, la Beijing-a Popola Radio kaj la Beijing-a Televidstacio.

#### INICIATINTOJ DE “AMIKOJ DE ESPERANTO”

**Chu Tunan**, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj

**Hujucz**, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo

**Bakin**, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda

Popola Kongreso, vicprezidanto de la Ĉina Literatura kaj Arta Federacio, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fama verkisto

**Xia Yan**, vicprezidanto de la Ĉina Literatura kaj Arta Federacio, prezidanto de la Ĉina Filmista Asocio kaj fama verkisto

**Xie Bingxin**, vicprezidanto de la Ĉina Literatura kaj Arta Federacio kaj fama verkistino

**Ye Shengtao**, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, fama verkisto kaj edukisto

**Zhao Puchu**, prezidanto de la Ĉina Budhana Asocio

**Bai Shouyi**, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj fama historiisto

**Jezezo**, vicprezidanto de la Komitato por Reformo de la Ĉina Skriba Lingvo kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo

**Zhu Jiusi**, estro de la Centraĉinia Politeknika Instituto

Kamaradoj,

Hodiaŭ okazas la inaŭguro de "Amikoj de Esperanto", kaj mi plej sincere ĝin salutas.

De kiam d-ro Zamenhof kreis Esperanton, preskaŭ ĉiuj, kiuj ĝin studas kaj disvastigas, inkluzive de Zamenhof, havas altan idealon kaj bonan intencon, kiuj lasas ĉiun landon kaj ĉiun nacion ne nur konservi kaj uzi sian propran lingvon, sed ĉefe fari Esperanton iom post iom komuna lingvo kaj tiel forigi la barojn inter la diversaj popoloj kaj inter la diversaj rasoj en la mondo. Tiel ili povos plue kompreni kaj respekti unu alian kaj fondi harmonian socion, en kiu ekzistas nenia ekspluato kaj subpremo, krom solidareco kaj interhelpo, egaleco kaj paco, amikaj rilatoj kaj komuna progreso.

La homaro certe ne akiros veran emancipiĝon, veran liberecon kaj veran feliĉon kaj lumon,

CHU TUNAN:

## Parolado ĉe la inaŭguro de "Amikoj de Esperanto"

se ĝi ne povos uzi sian komunan lingvon kaj fari laŭeble kunlaboron kaj komunan penadon por iom post iom venki sensciecon kaj malklerecon hereditajn de la prapatroj de la animaloj, por iom post iom malaperigi ĉiujn maljustajn militojn kaj ĉiajn terorojn kaj malamon, por iom post iom ĝisfunde reformi la socisistemon naskitan en la pasinteco, kun klasa ekspluato kaj subpremo, kun rasa diskriminacio kaj antaŭjuĝo.

Nun tio restas kompreneble ankoraŭ malproksima idealo,



Chu Tunan

malproksima espero. Kio gravas? Esperanto mem signifas esperon. Kune klopodu ĉiuj esperantistoj kaj daŭre marŝu antaŭen ĉiamaniere kaj tra diversaj vojoj por paŝon post paŝo realigi tiun esperon.

Mi estas nur simpatianto de Esperanto. Hodiaŭ vi fidas kaj instigas min. Kaj mi sekvos vin kaj faros ĉion eblan por kontribui al nia komuna afero.

Dankon!



### FRANCA ESPERANTISTO EN PEKINO

En novembro 1981, s-ro Bernard Jahier, franca esperantisto kaj leganto de "El Popola Ĉinio", venis al Pekino por labori kiel franclingva fakulo de "Pekinaj Informoj". La Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de El Popola Ĉinio okazigis tekonvenon por bonvenigi lin kaj lian edzinon. Ĝin ĉeestis, krom laborantoj de ĈEL kaj EPC, ankaŭ geesperantistoj de la Esperantaj Sekcioj de Radio Pekino kaj Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj kaj angla esperantisto s-ro G. Sutton, kiu nun portempe laboras en la redakcio de EPC. En varma amika atmosfero

s-ro Jahier faris mallongan paroladon, tuŝante interalie siajn impresojn post sia alveno al Ĉinio.

### ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO FONDITA

La Ĉina Esperanto-eldonejo fondiĝis en Pekino (Beijing) lastan januaron. Ĝi eldonos Esperantajn

librojn pri politiko, ekonomio, kulturo, arto kaj ĝeneralaj aspektoj de Ĉinio kaj ankaŭ Esperantajn lernolibrojn, vortarojn kaj legaĵojn. Ĝi traktos kun diverslandaj esperantistoj aŭ Esperantaj organizoj pri kunlaboro por eldonado kaj eldonos Esperantajn verkojn kun alta valoro kaj prestiĝo en la monda esperantista rondo.

*ĈEL kaj EPC-redakcio kunsidas por bonvenigi francan esperantiston Bernard Jahier kaj lian edzinon.*





## La Esperanto-movado en Ĉinio (1)

La ĉina esperanta movado havas la historion de pli ol 70 jaroj de post kiam Esperanto estis ekkonita de Ĉinio ĉe la komenco de la kuranta jarcento. La esperanta movado trapasis 4 etapojn.

La unua etapo, konata kiel la komenca periodo por enkonduki Esperanton en Ĉinion, daŭris de la komenco de la kuranta jarcento ĝis 1931. Laŭ historiaj notoj Esperanto iris en Ĉinion tra tri kanaloj.

La unua kanalo estas Rusio. Ĉ. 1891 en Vladivostok (Hajshenwai) okupita de la cara Rusio jam aperis esperanta asocio, kiu iam eldonis esperantan lernolibron kun klarigo en 12 lingvoj. Rusaj komercistoj, kiuj scipovis Esperanton, enkondukis Esperanton en la ĉinan urbon Harbin kaj sekve tie disvastiĝis Esperanto. Poste, alia ruso venis al Shanghai (Ŝanhajo) kaj fondis tie esperantan kurson, en kiu lernis Lu Shiqing (S. Ĉ. Lu) kaj aliaj. Post tio, Lu Shiqing fondis esperantan vesperlernejon en Shanghai. Tiamaniere Esperanton konis aliaj ĉinaj lokoj.

La dua kanalo estas Japanio. Je la komenco de la 20-a jarcento, ĉinaj studentoj Liu Shipei, Zhang Ji kaj aliaj, kiuj studis en Japanio, lernis Esperanton de anarkiisto sinjoro Oosugi Sakae, kaj eldonis la ĵurnalojn «Egaleco» kaj «Justeco» por prediki anarkiismon kaj propagandi Esperanton. En 1908 Liu Shipei kaj aliaj revenis hejmlanden

kaj fondis en Shanghai esperantan kurson.

Kaj la tria kanalo estas Francio kaj Britio. En 1907 la ĉina studento Hua Nanguai en Francio eldonis en Parizo gazeton «Scienca Revuo», kaj samjare Wu Zhihui kaj aliaj iniciatis en Parizo semajnan revuon «La Novaj Tempoj» en la ĉina lingvo. Ambaŭ eldonaĵoj energie propagandis Esperanton. Xu Lunbo, alia ĉina studento reveninta de Francio, fondis en Guangzhou (Kantono) esperantan kurson. Samtempe kun tio, ankaŭ ĉina studento Yang Zeng-gao en Britio komencis lerni Esperanton kaj ofte sendis al enlandaj amikoj esperantajn gazetojn kaj poste verkis la libron «Esperanto», kiu detale konigis Esperanton.

En 1909 Sheng Guocheng iniciatis en Shanghai la Ĉinan Esperantan Asocion kaj eldonis la ĵurnalon «La Mondo». Post la Revolucio de 1911, dank' al la disvastigo de diversaj novaj pensoj Esperanto rapide disvolviĝis en multaj lokoj de la lando. En 1911 Fengtian (nun Shenyang) fondis esperantan lernejon kaj en Zhangzhou ekaperis esperanta societo. Samjare, esperanta lernolibro kompilita de Lin Zhenhan estis eldonita de la redakcio de la Asocio de Sciencoj. En 1912 Cai Yuanpei, kiu funkciis tiam kiel la unua ministro pri edukado de la Provizora Registaro de la Ĉina Respubliko, ordonis al la normalaj lernejoj de la tuta lando preni Esperanton kiel nedevigan kur-

son. Samjare la Ĉina Esperanta Asocio estis reorganizita en la Esperantan Asocion de Respubliko de Ĉinio, kiu havis, laŭdire, pli ol 300 membrojn. La asocio fondis en Shanghai centran oficejon kaj elektis Lu Shiqing kaj Sheng Guocheng kiel delegiton kaj ties asistanton de la Unversala Esperanto-Asocio. Sub la centra oficejo establiĝis la esperanta koresponda fako, kies lernantoj troviĝis en multaj lokoj de la lando. Kaj krome, estis fonditaj ankaŭ ĝiaj branĉoj en Guangzhou, Changshu, Zhangzhou, Nanjing, Quanzhou kaj Qingdao ktp. En Changsha, Xiamen, Hangzhou, Zhuzhou, Kaifeng, Shaoxing ktp. fondiĝis esperantaj asocioj, kursoj, studrondoj ks. Tiujare eldoniĝis multaj esperantaj lernolibroj kaj legaĵoj, ekz. «Esperanto por Ĥino», «Esperanto» kaj «Konversacio» de Lu Shiqing, «Esperanta Lekciaro por Korespondado» de Sheng Guocheng kaj «E-to-Ĥina Vortaro» de Lü Tongsun kaj Xiong Ziyang.

En 1913, Liu Shifu iniciatis en Guangzhou la gazeton «La Krio de Koko», kiu poste estis alinomita «La Voĉo de la Popolo». Kvankam la gazeto propagandis ĉefe anarkiismon, tamen ĝi konigis Esperanton per kvarono de la paĝoj. Tiujare en Changsha fondiĝis esperanta lernejo, en Nanjing esperanta asocio, en Guangzhou esperanta instituto kaj en Taiwan (Tajvan) esperanta studrondo.

En 1914, en Changshu fondiĝis esperanta asocio, en Guang-

zhou esperantaj instituto kaj lernejo, ankaŭ en Aomen kaj Xianggang (Hongkong) aperis esperantaj organizoj.

Iom poste, dank' al iniciato de la gazeto «Nova Junularo», la esperanta movado pli vaste disvolviĝis en diversaj lokoj de Ĉinio. Ekde 1916 ĝis 1919, la gazeto faris diskutadon pri Esperanto. Qian Xuanton kaj Lusin publikigis siajn artikolojn por varme subteni Esperanton. Tiam unu post alia fondiĝis la Beijing-a Esperanta Asocio, Fuzhou-a Esperanta Grupo, Tianjin-a Esperanta Lernejo, Chengdu-a Esperanta Klubo, Foshan-a Esperanta Ekspoziciejo, Guangzhou-a Esperanta Asocio kaj Shanghai-a Esperanta Asocio. Ĉiuj tiuj organizoj faris kontribuojn por la esperanta movado de Ĉinio. Inter ili la plej grandan kontribuon faris la Shanghai-a Esperanta Asocio organizita de Hu Yuzhi (Hujucz), Bakin, Chen Zhaoying kaj Sofio. Tiu asocio fondis esperantajn korespondan lernejon, bibliotekon kaj librejon kaj poste iniciatis la gazeton «Verda Lumo», kiu dum pli ol 10 jaroj multe kontribuis al la ĉina esperanta movado en la dudekaj jaroj.

Ĉi tie mi volus iom menciigi pri la subteno de Cai Yuanpei, fama ĉina demokratia revoluciulo, al Esperanto. En 1917, kiam li funkciis kiel rektoro de la Beijing-a Universitato, li decidis, ke Esperanto estu nedeviga kurso de la universitato, kaj invitis Sun Guozhang (K.Ĉ. Sun) kiel instruiston. En la Sepa Tutlanda Eduka Konferenco li proponis plenumi la decidon publikigitan de la Eduka Ministerio en 1912, ke Esperanto estu prenita kiel kurso de normalaj institutoj. En 1922 li invitis la faman rusan poeton

Vasilij Eroŝenko instrui Esperanton en la Beijing-a Universitato. Poste, por pluapaŝa esplorado de Esperanto, la Beijing-a Universitato fondis esperantan studrondon kaj Cai Yuanpei funkciis kiel ĝia estro. En 1923 li kaj Wu Zhihui, Chen Shengshu kaj aliaj fondis la Beijing-an Esperantan Lernejon. Lusin, ĉina granda literaturisto, konsentis instrui «Skizon pri la Historio de Ĉinaj Noveloj kaj Romanoj» por esprimi sian subtenon al Esperanto. En 1924 Cai Yuanpei ĉeestis la 16-an Universalan Kongreson de Esperanto, okazigitan en Vieno.


En la dudekaj jaroj, la esperanta movado en Guangzhou estis vigla, dank' al la subteno de Wu Daguang, estro de la Eduka Buroo de Guangzhou, Huang Zunsheng kaj Xu Lunbo, profesoroj de la Zhongshan-a Universitato. Tiam, en la urbo fondiĝis multaj esperantaj organizoj, ekz. la Guangzhou-a Esperanta Normala Instituto, la Wenlan-a Esperanta Studrondo, la Guangzhou-a Esperanta Instituto kaj ties 4 branĉoj, la Esperanta Asocio de la Zhongshan-a Universitato ktp. En pli ol 20 universitatoj kaj mezlernejoj de la urbo, kiel la Zhongshan-a Universitato, la Lingnan-a Universitato kaj aliaj, Esperanto estis prenita kiel nedeviga kurso. Poste, la Guangzhou-a Esperanta Asocio organizis esperantan instruon grupon por instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj kaj institucioj. Tia prospero daŭris ĝis la mezo de la tridekaj jaroj.

En la fino de la dudekaj jaroj, fondiĝis la Esperanta Asocio en Hankou, kiu distribuis la monatan gazeton «La Espero» kaj fondis librejon Verda Stelo,

esperantan bibliotekon, someran lernejon kaj dimanĉan lernejon. Tiel Hankou fariĝis unu el la centraj urboj de la esperanta movado post Shanghai, Beijing kaj Guangzhou.

En tiu periodo ankaŭ en Tianjin, Shenyang, Nanjing, Hangzhou, Fuzhou, Taiyuan, Kunming, Qingdao, Shaoxing, Zhenjiang kaj aliaj pli ol dek urboj disvolviĝis esperanta aktivado. Plejparto de la partoprenantoj en la lernado estis intelektuloj kaj studentoj. Ili propagandis, ke dank' al Esperanto oni povas «legi librojn kaj ĵurnalojn el pli ol 50 landoj», «rekte legi fremdlandajn sciencajn librojn por akiri novajn sciojn», aŭ «vojaĝi alilande» kaj korespondi kun samideanoj en diversaj landoj. Iuj el ili sopiris al nacia egaleco kaj «granda harmonio de la mondo». Influate de la Zamenhofaj esperantismo kaj homaranismo, ili tenis sin neŭtrale al la realo kaj havis en si la tendencon «ĉion por Esperanto». Sed, ankaŭ parto de la esperantistoj uzis la lingvon en la ĉina reala batalado, ekzemple, ili proponis per Esperanto reformi la ĉinajn ideografiajn por akceli la socian progreson. Alia ekzemplo, post la «Masakro de la 30-a de Majo» en 1925, la Shanghai-a Esperanta Asocio per Esperanto malkaŝis la fakton de tiu ĉi evento al la esperantistoj de la mondo. Alia parto de la esperantistoj komencis tradukadon per Esperanto, t.e. unuflanke, el Esperanto ĉinigi literaturojn de fremdlandaj subprematoj, aliflanke, esperantigi la progresemajn literaturojn de nia lando, ekz. «La Vera Historio de AHQ» de Lusin kaj «Ŭan Ĉaŭ Ĉun» de Guo Moruo kaj aliaj verkoj, por ilin konigi al la mondo.





## Inter rumanaj esperantistoj

de ZHANG DEYUAN

En la tria tagdeko de junio 1981, mi, kiel estro de la ĉina teknikista grupo kaj esperantisto, veturis per aviadilo kune kun miaj tri kolegoj al la amika kaj bela lando Rumanio. Dum la kvarmonata restado en Rumanio ni ĉie sentis profundan amikecon de la tieaj popolo kaj esperantistoj al la ĉina popolo kaj esperantistoj.

En fabriko de Tulcea, laboristoj kaj inĝenieroj iniciative helpis nin en la laboro. Nia interpretisto kamarado Vašilesku venis al Yumen-petrolkampo de Gansu-provinco de Ĉinio en la kvindekaj jaroj por munti tie rumanajn drilegojn. Dufoje li venis al Ĉinio kaj foje laboris tri jarojn. Dum tiu tempo li lernis de ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj la ĉinan lingvon. Vašilesku ofte rakontis al ni pri siaj agrablaj tagoj en Ĉinio. Li ĝojis ke liaj kamaradoj diris ke li similas al ĉino.

Foje, kiam mi promenis sur strato de Bukareŝto, nekonata viro pli-ol-50-jara min salutis per Esperanto, vidinte verdan stelon sur mia brusto. Li estas kamarado Ion Bunesku, prezidanto de la Bukareŝta Esperanto-Klubo. Adiaŭante, li donis al mi sian adreson kaj esperas ke ni ofte kontaktiĝos en la estonteco.

Je la 2-a de la pasinta oktobro mi kun Zhang Baoyi de la redakcio de la bildgazeto "Ĉinio", kiu laboras en la redakcio de la rumana bildgazeto "Rumanio", vizitis profesoron Dominte, ĝeneralan sekretarion de la Rumana Esperanta Organizo. Mi transdonis al li kvar silkajn portretojn de Zamenhof, kelkajn ekzemplerojn de "El Popola Ĉinio", dekelkajn Esperantajn librojn kaj dekojn da verdstelaj insignoj, donacitajn de ĈEL al la Rumana Esperanta Organizo. Prof. Dominte esprimis sian profundan dankon kaj donacis al ni novan "Esperanto-Rumanan Vortaron". Ni interŝanĝis informojn pri la Esperanto-movado de ambaŭ landoj.

La 4-a de oktobro estis serena dimanĉo. Invitite de profesoro Dominte, mi kaj kamarado Bunesku, dekelkaj rumanaj profesoroj kaj inĝenieroj ĉeestis enhavoriĉan kunsidon en la Kultura Palaco de la urbo. En la kunsido kamarado Bunesku, prezidanto de la Bukareŝta Esperanto-Klubo, faris paroladon por min bonvenigi kaj tuj sekve, mi donis respondajn vortojn. Mi dankis la rumanajn amikojn pro ilia varma akcepto kaj transdonis koran saluton de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la ĉinaj esperantistoj al rumanaj

esperantaj organizoj kaj esperantistoj. Mi koncize rakontis al ili pri la disvolviĝo de la ĉina Esperanta movado en la lastaj jaroj kaj montris esperon plifortigi la amikecon kaj kontakton inter la Esperantaj organizoj kaj esperantistoj de la du landoj, helpi unu alian kaj kontribui per Esperanto por pliigi la amikecon inter diverslandaj popoloj kaj defendi la mondpacon.

La rumanaj kamaradoj esprimis ĝojon kaj admiron pri la atingoj de la ĉina Esperanta Movado. Ili opinias ke "El Popola Ĉinio" estas tre bona kaj bela gazeto. Ili ĉiuj estas ĝiaj abonantoj kaj iuj el ili ĉiutage aŭskultas Esperantan elsendon de Radio Pekino. Ili laŭdis ke la elsendo estas klara kaj la voĉo de la parolistoj bela. Mi donacis al la ĉeestantoj insignojn, ĉinajn monerojn kaj refreŝigajn ŝmiraĵojn, kaj ili siaflanke donacis al mi bildkartojn, foton de Doktoro Zamenhof kaj albumon pri famaj italaj pentraĵoj.

Post la kunsido ni kune fotiĝis por memorigo. Kelkaj amikoj akompanis min por rigardi la urbon Bukareŝto. Mi deziras, ke la amikeco inter la esperantistoj de la du landoj daŭru kiel la nerompebla fluo de la blua Danubo.

## PORINSTRUISTA ESPERANTO-KURSO EN PEKINO

En la pasintaj du jaroj nombro da ĉinaj altaj lernejoj starigis aŭ restarigis Esperanto-kurson. Por kontentigi la bezonon de fremdlingva instruado, la Ĉina Esperanto-Ligo fondis, sub sankcio de la Eduka Ministerio, porinstruistan Esperanto-kurson en novembro 1981 en la Fremdlingva Kolegio dependa de la Pekina Fremdlingva Instituto. La kurson vizitas pli ol 20 junaj instruistoj el la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Universitato de Wuhan, Universitato de Jilin, Universitato de Lanzhou, Universitato de Shandong, Normala Universitato de Xinjiang, Universitato por Iamaj Elmigrintaj Ĉinoj kaj aliaj naŭ altaj lernejoj. Tiuj instruistoj plejparte scipovas eŭropan lingvon kaj havas sperton en instruado. Post unujara lernado ili revenos al sia lernejo instrui nian lingvon.

## AKTIVADOJ DE ESPERANTISTOJ EN LANZHOU

Okaze de la unua datreveno de la fondiĝo de la Esperanto-grupo de Lanzhou, la lokaj esperantistoj havis

diversajn aktivadojn. Ili okazigis celebran kunvenon, projekciis lumbildojn pri Esperanto, prezentis Esperantajn programerojn kaj aranĝis la Ekspozicion de Libroj kaj Gazetoj en Esperanto — Lingvo de Espero, kiu montris eldonaĵojn de Esperantaj organizaĵoj el ĉirkaŭ 30 landoj.

## ESPERANTAJ AKTIVADOJ EN ĈINAJ ALTLENEJOJ

La 28-an de oktobro pasintjare la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de Jiangsu okazigis, en la Instituto pri Fremdlanda Literaturo sub la Universitato de Nankino, adiaŭan tekunvenon por vicprofesoro Ye Fengzhi. Ye estas membro de la preparaj grupoj de la Esperanto-Asocioj de Jiangsu kaj Nankino. Antaŭe li donis lecionojn en Esperanto-kursoj en la Universitato de Nankino kaj la Nankina Normala Instituto. Ĉi-foje li flugis al FR Germanio lekcii por du jaroj laŭ invito de la Munkena Universitato. Li esprimis, ke li kontribuos por cementi la amikecon inter la esperantistoj de ambaŭ landoj.

Lastatempe la Centra-Ĉinia Normala Instituto funkciigis tri Esperanto-kursojn vizitatajn de 150 instruistoj kaj studentoj. Fininte tiujn kursojn, oni funkciigos pliajn

kursojn por plenumi la ardan deziron de multaj aliaj interesitoj.

Ekde la 20-a ĝis la 22-a de novembro 1981 la Esperanta Societo de la Ŝanhaja Martransporta Instituto okazigis Esperantan ekspozicion, kiu montris multajn esperantaĵojn — 200 librojn, 50 gazetojn, 300 poŝtkartojn kaj 200 poŝtmarkojn. La fama ĉina verkisto Bakin skribis vortojn por la ekspozicio.

## ESPERANTO-KURSO EN HUHROT

Decembre de 1981 la Esperanto-Asocio de Huhhot (Huhehoto), la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, unuafoje okazigis Esperanto-kurson, en kiu lernas cent ŝtatoficistoj, laboristoj, instruistoj, sciencistoj kaj teknikistoj. Ĉe la inaŭguro de la kurso parolis Debao, vicestro de la Propaganda Departemento de la Urba Komitato de KPĈ, kaj Peng Jianbin, vicprezidanto de la Scienca Asocio de la urbo.

## KELKAJ INFORMOJ PRI 67A U.K. EN ANTVERPENO (1982 07 24-31)

Kongresejo por la 67a U.K. fariĝos la konferenca salonaro de la Reĝa Zoologia Ĝardeno en Antverpeno, kiu troviĝas tre oportune apud la ĉefa stacidomo.


Lia Reĝa Moŝto Baldueno, suvereno de Belgio, akceptis roli kiel Alta Protektanto de la Universala Kongreso ĉijara.

La kongresa temo estas "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado".

Kiel kutime, kleriĝemaj kongresanoj povos aŭskulti spertulojn el la tuta mondo pri diversaj sciencaj kaj kulturaj temoj en la Internacia Kongresa Universitato.

Unu tago de la kongresa semajno estos dediĉita al la instruado de Esperanto. Antaŭvideblaj estas prelegoj kaj diskutoj pri instrumentodiko kaj instrumaterialoj kaj pri la vort-

*Esperanto-ekspozicio okazigita de la Lanzhou-a esperanta grupo*





trezoro kaj strukturo de Esperanto kiel instruobjektoj.

Belartaj konkursoj en 1982 havos kvin branĉojn: poezio, prozo, eseo, dramo kaj fotografio.

En Loveno (Leuven), oriente de Bruselo, renkontiĝos junaj esperantistoj por la 38-a Internacia Junulara Kongreso (1982 07 31 — 08 07). La kongresanoj kunsidos pri la temo "Scienco kaj Socio".

Okazos ankaŭ la 50a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Breda, 50 km. norde de Antverpeno. Tiun kongreson organizos nederlandaj kaj flandraj esperantistoj.

### **BRAZILO POST LA 66-A UK**

Dek naŭ geinstruistoj gvidas Esperanto-kursojn por 303 gelernantoj en la brazila urbo Salvadoro. Kiel en la resto de la lando, ankaŭ en Salvadoro oni sentas kreskon de la intereso pri la Internacia Lingvo post la 66-a Universala Kongreso en Brazilio.

### **3-A IMEK EN RUSE BULGARIO**

La 3-a Internacia Medicina Esperantista Konferenco okazis en Ruse, Bulgario, de la 15-a ĝis la 19-a de julio 1981. El dek landoj partoprenis ĝin 220 personoj, kuracistoj, apotekistoj, dentistoj, flegistinoj kaj aliaj. Dum la konferenco estis faritaj 43 fakaj, sciencaj prelegoj.

La plena kunsido de la konferenco akceptis proponojn, kies esenco estis:

— Esperantlingva eldono de la eldonadoj de Medicina Mondorganizaĵo.

— UMEA klopodos kunlabori kun Internacia Ruĝa Kruco.

— Esperanto estu unu el la oficialaj laborlingvoj de medicinaj kongresoj.

— Instrui Esperanton al kuracistoj kaj estontaj kuracistoj.

— Aperigo de esperantlingvaj medicinaj faklibroj kaj fakrevuoj.



*Esperanta kurso en la Centra-Ĉinia Normala Instituto*

### **KONKURSO DE PRIKOMPUTA- DAJ ARTIKOLOJ**

Komputista Sekcio de ISAE anoncas konkurson verki artikolojn pri ĉiuj temoj de komputado en larĝa senco, de la teorio ĝis la konkreta aplikado.

La maksimuma amplekso, 4-5 tajpitaj paĝoj de formato DIN A/4, sed kompreneble indikeblas, ke ĉe la aŭtoro mendeblas pli ampleksa traktado.

La ricevitaĵojn materialojn pritakas internacia juĝantaro por elekti la aperomeritajn. El aŭtoroj de ĉiuj 20 aperantaj artikoloj unu ricevos senpagan restad-eblecon en iu internacia komputista konferenco kiu okazos en 1982. Krom tio estos disdonitaj multaj valoraj premioj: libroj, kasetoj, periodaĵoj ktp.

La artikolojn sendu al Komputista Grupo de HEA/H-1368 Budapeŝto Pf. 193., Hungario. Limdato: 1982-03-15.

### **AŬTUNA STUDRAPORTO DE JEI EN NAGOYA**

La aŭtuna studraporta kunveno de JEI por 1981 estis aparte enha-

voriĉa kun entute sep raportoj krom unu speciala prelego. Ĉi-foje la kunveno estis invitita al la urbo Nagoya, kaj dank' al la energia antaŭpreparo de aktivuloj de la JEI-filio en Nagoya, sub la gvido de Morita Akira kaj Nagase Yosikatu, la nombro de raportantoj estis rekorde granda por unu-taga aranĝo. Partoprenis la kunvenon 45 personoj inkluzive de ok parolantoj la 8-an de novembro en la Soci-Eduka Centro Higasi de Urbo Nagoya. Dum kvin horoj prezentiĝis tre diversstaj studoj pri Esperanto. La nomaro de la raportantoj, kiun la aranĝantoj anticipe dissendis al multaj JEI-membroj, allogis la ĉeestantojn ne nur de tiu kunvenloko, sed ankaŭ de aliaj pli-malpli foraj urboj kaj distriktoj.

### **LA 12-A ESPERANTISTA ŜAK- FESTIVALO**

La 12-a Esperantista Ŝak-Festivalo okazos de la 5-a ĝis la 16-a de julio 1982, en Wschowa, Pollando. La ĉefa celo de la aranĝo estas disvolvi la amikecon inter popoloj de diversaj landoj kaj konigi al la loĝantaro de Wschowa la internacian lingvo-problemon kaj la nunan staton de la Esperanto-movado en la mondo.

# POR LA JUBILEO DE ESPERANTO

En preparo por la unika jubileo — la centa datreveno de Esperanto en julio 1987 — la UEA-estraro publikigis en la ĉefa artikolo de la oktobra numero de “Esperanto” 1981 malneton de “Plano por la periodo 1983—1987”, por ke ĝi estu bazo de kiel eble plej vasta diskuto. Ĉi-sube prezentiĝas la ĉefaj punktoj de la malneta plano.

Ekzistas bona ebleco, ke la Ĝenerala Asembleo de UN nomos la jaron 1983 Internacia Jaro de Komunikado. Tiu jaro estu la komenco de kvinjara periodo, en kiu UEA donos apartan publikan atenton al internacia komunikado kaj la rolo de Esperanto en tiu komunikado. La diversaj aktivecoj atingu sian kulminon en 1987, la Jaro de la Internacia Lingvo.

La Patrona Komitato por la kvinjara periodo estu starigita antaŭ la fino de 1982. Oni ankaŭ instigu la landajn asociojn formi siajn proprajn similajn patronajn komitatojn, kiuj konsistu el anoj de la internacia komitato plus aliaj. La celoj de la komuna agado estas jene:

1. Vasta publika atento pri la lingva diskriminacio, lingvaj problemoj kaj la historio, nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto.

2. Konkreta rekono de Esperanto fare de la ĉefaj internaciaj

organizoj kaj la ĉefaj registaroj de la mondo.

3. Vasta pligrandigo de la nombro de simpatiantoj al Esperanto.

La Universala Kongreso de 1987 okazu prefere en Varsovio kaj havu la formon de Festivalo de Esperanto, prefere du semajnojn longa, kiu emfazas kaj la centjariĝon de E-kulturo kaj la praktikan utiligon de Esperanto. Estu enplektita en la aferon je plej alta nivelo la pola registaro, kaj estu paralelaj publikaj eventoj por la neesperantista pola publiko.

La eldona agado konsistu interalie el:

1. Ĝis 1987 eldono de Enciklopedio de Esperanto.

2. Ĝis 1984 eldono de nova Fundamenta Krestomatio.

3. En 1987 aperigo de jubilea numero de “Esperanto” en pluraj lingvoj.

4. Ellaboro de baza libro (kun ilustraĵoj) pri Esperanto kaj ĝia historio, kaj aperigo de tiu libro en kiel eble plej multaj lingvoj.

5. Ellaboro de volumo de elektitaj verkoj de Zamenhof, kaj ĝia nacilingva aperigo pere de nacilingvaj eldonejoj.

UEA mem kunvoku, eventuale en kunlaboro kun kelkaj

internaciaj neesperantistaj fakaj organizoj, internaciajn konferencojn pri la historio de Esperanto kaj pri la lingvo Esperanto.

Rilate al edukado estu lanĉo de koresponda universitato, kiu uzas Esperanton, kaj pretigo de taŭga materialo pri la jubileo por utiligo en lernejoj.

Ellaboru bazajn artikolojn kaj bazan fotaron pri Esperanto por aperigo en nacilingvaj gazetoj aŭ iliaj specialaj numeroj. UEA faru kontakton kun televidaj instancoj por aranĝi grandan jubilean eventon kun tutmonda disvastigo. Poŝtaj instancoj diverslandaj estu konvinkitaj por aperigi poŝtmarkojn jubileajn. UEA ankaŭ aperigu glumarkojn k.s. objektojn kaj ĝis 1983 eldonu porteban kaj facile munteblan ekspozicion pri Esperanto ĝisdatigotan de tempo al tempo.

Ĉiu lando havu sian propran planon, kunordigitan kun tiu de UEA. En 1987 mem, okazu kunordigitaj aktivecoj internacie atentokaptaj en kiel eble plej multaj landoj samtempe.

Ĉe la fino de la ĉefa artikolo la estraro de UEA emfazis, ke ni ne eniru la preparojn por la Jubilea Jaro kun iluzioj pri la proksimeco de la fina venko de Esperanto. Male, ni konsciu, ke restas ankoraŭ longa vojo por konvinki la amasojn pri Esperanto. Estas ankaŭ tre grave, ke ni konsciu, ke ĉi-foje temas pri la centjara jubileo de la Zamenhofa lingvo, kiu devas unuigi nin ĉiujn, senrigarde al niaj movadaj apartenoj kaj preferoj. La Jubilea Jaro koncernas ne nur UEA, SAT kaj aliajn internaciajn kaj naciajn Esperanto-organizaĵojn, sed ĝi plene rilatas ĉiun unuopan parolanton kaj amikon de la Internacia Lingvo.





La Azia Konferenco de Parlamentanoj pri Disvolvokaj Loĝantaro okazigita en Pekino en oktobro 1981

## Tendenco de loĝantaro en Azio

de WANG ZONGCAI

**L**A problemo de loĝantaro estas unu el la gravaj demandoj atentataj de la mondo. Parolante pri tio, multaj montris grandan maltrankvilon. Azio estas la plej dense loĝata loko en la mondo. La tendenco de loĝantaro en Azio kaj la rilato inter kresko de ĝia loĝantaro kaj ekonomia disvolviĝo estas atentata ne nur de la registaroj kaj popoloj en Azio, sed ankaŭ de la aliaj landoj en la mondo.

Nun en Azio estas 2.6 miliardoj da loĝantoj, kiuj konsistigas du trionojn de la totala loĝantaro de la mondo. En la mondo kvar el la sep landoj, ĉiu kun pli ol cent milionoj da loĝantoj, troviĝas en Azio. En la pasinteco la loĝantaro malrapide kreskis en multaj aziaj landoj politike neliberigitaj, kie la ekonomio disvolviĝis malrapide kaj la popoloj vivis tre mizere. En la unuaj jaroj de la dudeka jarcento Azio havis 866 milionojn da loĝantoj. En la kvindek jaroj de 1900 ĝis 1950 la kreskokvan-

to de aziaj loĝantoj estis 0.8%. Sed post la kvindekaj jaroj multe ŝanĝiĝis la stato de ĝia loĝantaro. Dank' al la disvolviĝo de la ekonomio kaj pliboniĝo de medicinaj kondiĉoj, tre rapide kreskis la loĝantaro en la aziaj disvolviĝantaj landoj liberigitaj, kie la mortokvanto reduktiĝis de pli ol 2% ĝis 1.1%, dum la naskokvanto neniom malpliĝis. De 1950 ĝis 1970 la kreskokvanto de loĝantoj en Azio estis 2% kaj en la jaroj de 1970 ĝis 1978 2.2%: 0.2% pli multe ol tiu de la aliaj lokoj de la mondo en la sama periodo.

Certagrade progresis la ekonomio en la disvolviĝantaj landoj sendependiĝintaj, sed pro ilia malbona ekonomia bazo kaj tro rapida kresko de loĝantoj, granda parto de la fruktoj de ilia ekonomia disvolviĝo estis donita por la kresko de loĝantoj. En 1980 la meznombra produkta valoro de ĉiu homo en la mondo estis 2,040 usonaj dolaroj. Tiu en la disvolviĝantaj landoj

estis 560 usonaj dolaroj kaj tiuj en suda Azio kaj en sudorienta Azio estis 180 kaj 400 usonaj dolaroj respektive, kiuj estis ne nur sub la monda nivelo, sed ankaŭ sub la meznombra nivelo de la disvolviĝantaj landoj.

Alia okulfrapa problemo de loĝantaro de nemalmultaj disvolviĝantaj landoj en Azio estas, ke la nombro de urbaj loĝantoj kreskas pli rapide ol tiu en la kamparo. En 1950 la nombro de loĝantoj en la urboj konsistigis ĉ. 10% de la totala nombro de loĝantoj, sed en 1970 tiu jam superis 20%. En suda Azio la urboj plimultiĝis je 45 milionoj en la jaroj de 1970 ĝis 1975, inter kiuj 41% transloĝiĝis el la kamparo. La rapida multiĝo de la urbaj loĝantoj kaŭzis multajn malfacilojn en dungigo, eduko, loĝado, publikaj instalaĵoj, media protekto k.a.

La alta naskokvanto kaj malalta mortokvanto en Azio estigis juniĝon de aĝoj. La infanoj kun aĝo de malpli ol 14 jaroj konsistigis 37% de la totala nombro de loĝantoj en 1980 (24% en Eŭropo kaj 23% en Ameriko), dum maljunuloj kun aĝo de pli ol 65 jaroj konsistigis 4% de la totala nombro de loĝantoj en 1980 (12% en Eŭropo kaj 11% en Norda Ameriko). Ĝuste pro tio Azio alfrontas la problemojn de dungigo, nesufiĉo de edukaj instalaĵoj por mezaj kaj elementaj lernejoj kaj malfacila loĝado. Estas aparte menciinde, ke la kresko de loĝantoj kaŭzis grandan malfacilon en provizo de greno, vestaĵoj kaj aliaj vivbezonaĵoj. La kresko de greno en la granda parto de aziaj landoj estas ĉ. 3%, dum la kresko de loĝantoj ĉ. 2%. Kvan-

kam la kresko de greno superis tiun de loĝantoj, tamen la meza homa porcio de greno ne multe kreskis.

Ĉio ĉi montras, ke Azio alfrontas gravan problemon de rapida kresko de loĝantoj, kaj por solvi ĝin estas nepre necese, krom disvolvi la ekonomion, ankaŭ limigi la homplimultiĝon.

En la pasintaj jaroj la registaroj kaj popolaj organizaĵoj de Hindio, Pakistano, Srilankao, Filipinoj, Singapuro, Turkio k.a. disvastigis la "familian planadon". En 1981 dek ok landoj, kies loĝantoj konsistigis 94% de la totala nombro de loĝantoj en Azio, alprenis politikojn por bridi la kreskon de loĝantoj kaj atingis certan sukceson. Laŭ kalkulo, en la sama jaro la natura kreskokvanto de loĝantoj en Azio estis 1.8%, multe malpli alte ol tiu en Afriko kaj Latin-Ameriko.

Ĉar malsamaj estas la statoj de ekonomio, kulturo kaj prilogaĵo de diversaj landoj, malsamaj estas ankaŭ iliaj politikoj koncerne loĝantaron. Ekzemple, plejparto de la aziaj landoj alprenis politikon limigi la kreskon de la loĝantaro, sed iuj landoj en sudokcidenta Azio, kiuj opinias taŭga la kreskon de sia

loĝantaro, intencas ne praktiki politikon limigi la kreskon de loĝantaro, nek kuraĝigi la kreskon. Kaj ankaŭ kelkaj landoj, kiel Irako kaj la Demokratia Kamboĝo, alprenis politikon kuraĝigi naskon.

UNO asertas, ke en la jaro 2000 la loĝantoj en Azio atingos 3.6 miliardojn, t.e. plimultiĝos je 1.05 miliardoj en la venontaj dudek jaroj. Tiam en la mondo estos dek unu landoj, kiuj havos ĉiu pli ol cent milionojn da loĝantoj, kaj ses el ili troviĝos en Azio. Tiam la loĝantaro de Ĉinio kaj Hindio konsistigos 36% de la monda loĝantaro, dum tiu de Indonezio, Bangladeŝo, Pakistano kaj Japanio konsistigos kvinonon de tiu de Azio.

La kresko de la loĝantaro en Azio multe influas la tendencon de la monda loĝantaro. Laŭ la decido de la Konferenco de Parlamentanoj pri Disvolvo kaj Loĝantaro okazigita en Kolombo en 1979, okazis en Pekino en oktobro 1981 la Azia Konferenco de Parlamentanoj pri Disvolvo kaj Loĝantaro. La konferencon ĉeestis pli ol ducent parlamentanoj kaj erudiciuloj el 18 aziaj landoj, kiuj interŝanĝis siajn opiniojn kaj spertojn pri la

konferenca temo. Ili unuanime opiniis, ke oni nepre devas konformigi la kreskon de loĝantaro al la ekonomia disvolviĝo por la celoj de socia progreso, ekonomia disvolvo, kultura progreso kaj plibonigo de la popola vivo. La konferenco akceptis "La Pekinan Deklaracion pri Loĝantaro kaj Disvolvo".

La deklario montris, ke la politiko pri loĝantaro kaj naskolimigo aplikita en Azio en la pasintaj 20 jaroj malmultiĝis la naskokvanton de loĝantoj de la mondo. Sed la nombro de loĝantoj de Azio jam atingis 2.6 miliardojn, kiuj konsistigas pli ol 60% de la totala nombro de loĝantoj en la mondo, tial la aziaj landoj devas daŭre apliki politikon por akordigi la kreskon de loĝantoj kun la disvolviĝo. Samtempe ĝi postulis, ke parlamentoj, registaroj kaj aliaj organizaĵoj de Azio mobilizu pli multajn homojn por prizorgi la problemon de loĝantaro kaj disvolvo, por ke la kreskokvanto de loĝantoj en Azio malleviĝu al 1% en la jaro 2000. Kaj krome ĝi proponis, ke UNO difinu "Tagon de la Monda Loĝantaro" por levi atenton de la diverslandaj popoloj al la problemo de loĝantaro.



Por sola



Por du



Por pluraj

Pentritaj de ZHANG LI kaj CHEN MUYUAN

# Ĉinio regas kreskon de sia loĝantaro

## MALTRANKVILIGA KRESKO DE LA LOĜANTARO

Nun la diverslandaj popoloj, politikistoj, ekonomikistoj kaj priloĝantaraj specialistoj zorgas de diversaj flankoj pri la problemo de la monda loĝantaro kaj pli-malpli multe pri tiu de la ĉina loĝantaro kaj ĝia solvo.

La problemo de la ĉina loĝantaro vekis atenton de la publiko, ĉar Ĉinio estas lando kun la plej grandnombra loĝantaro. Je la fino de 1980 la tuta lando (inkluzive la provincon Taiwan) havis preskaŭ miliardon da loĝantoj, kaj tiu nombro konsistigas ĉirkaŭ 22% de la monda loĝantaro. Tial la klopodo de Ĉinio regi la kreskon de ĝia loĝantaro kaj solvi tiun problemon havas grandan influon al la ĝenerala tendenco de la monda loĝantaro kaj la maniero solvi la problemon. Pli ol 80% de la ĉinoj vivas en la kamparo. Por bone trakti la rilatojn inter la loĝantaro de Ĉinio en unu flanko kaj ĝia ekonomia kaj socia disvolviĝo en la alia, oni devas, en konsiderinda grado, solvi la loĝantaran problemon de la 800-miliona kamparanaro. Tio estas aparta afero por Ĉinio. Kun la disvolviĝo de la socia produktado post la fondo de la Popola Respubliko, rimarkinde pliboniĝis la popola vivo kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo, rapide progresis la medicino kaj higieno, la mortokvanto malleviĝis de pli ol 2% antaŭ la Liberiĝo ĝis sub 0.8% en la sepdekaj jaroj, sed dum sufiĉe longa periodo la naskokvanto neniom malleviĝis kaj la procento de

natura kresko de la loĝantaro altiĝis meznombro je 2%. La pliparto de la ĉinoj estas juna. Laŭ statistiko de la jaro 1975, la ĉinaj infanoj sub la aĝo de 14 jaroj konsistigis 36.8%, dum la ĉinaj maljunuloj super la aĝo de 65 jaroj malpli ol 5%, tial la ĉefa problemo de la ĉina loĝantaro estas vivteni kaj eduki la infanojn kaj havigi laborpostenojn al la junuloj. Ĝi diferencas de la grava problemo pri la maljunula vivo ekzistanta en iuj aliaj landoj.

Kvankam la ĉina ekonomio multe disvolviĝis post la Liberiĝo, tamen ĝi tre postrestas kompare kun tiu de la evoluintaj landoj, kaj tian situacion oni ne povas ŝanĝi en mallonga tempo. Tial la ĉina registaro devas koncentri siajn fortojn por disvolvi la nacian ekonomion kaj samtempe regi la kreskon de la loĝantaro, por ebligi rapidan altigon de la po-kapa kvanto de la totala nacia produktovalor. Tio estas grava tasko por la ĉina popolo, intime rilata al la celo modernigi la landon.

## SUKCESA NASKOLIMIGO

La malnova Ĉinio havis gravan problemon de loĝantaro karakterizatan per terura senlaboreco kaj bankroto de kamparanoj. La popolo vivis en mizero kaj malsato. Post la fondo de la nova Ĉinio establiĝis kaj disvolviĝis la socialisma ekonomio dank' al la klopodo de la registaro kaj la popolo, kaj tiel kontentiĝis la bezono de la popolo pri nutraĵo kaj vesto. Sed la rapida kresko de la loĝantaro

kaŭzis malfacilegon al la socia ekonomio de la ŝtato. Ekz-e, ĉiujare ĉirkaŭ tri milionoj da junaj urbanoj kaj 20 milionoj da junaj vilaĝanoj devas ricevi okupon, tiel ke la ŝtato kaj la kolektivoj malfacile aranĝas tiom da novaj laborfortoj. Rilate akumulon kaj konsumon, granda parto de la nove pliigitaj naciaj enspezoj estas uzita por kontentigi la bezonon de la ekzistantaj loĝantoj kaj la novnaskitoj, sed ne povas esti uzata por komuna akumulo kaj pliigo de fonduso por konstrua celo. Dum la 25 jaroj de 1953 ĝis 1978, 58% de la nova jara monsumo por konsumo celo estis uzataj por kontentigi la bezonon de la novnaskitoj, sed nur 42% por levi la vivnivelon de la ekzistantaj loĝantoj. Kaj la eduka disvolviĝo ankoraŭ ne povas adaptiĝi al la situacio de la loĝantara kresko. Nun ĉirkaŭ 95% de la ĉinaj lernaĝaj infanoj vizitas elementan lernejon, 88% de la elementlernejoj povas eniri en malsuperan mezlernejon, duono de la geknaboj ne povas ricevi la tutan mezlernejan edukon, kaj tre malmultaj gejunuloj estas akceptitaj en altan lernejon. Evidente tio ne estas bona por klerigi la tutan nacion.

Tial, samtempe kun la intensa ekonomia konstruado kaj impeta disvolvo de la sociaj produktaj fortoj, oni devas kun plena energio stabiligi la nombro de la loĝantaro, altigi ĝian kvaliton kaj adapti la loĝantaran kreskon al la disvolviĝo de la nacia ekonomio por



kiel eble plej rapide efektiviĝi la modernigon de la lando.

De la 70-aj jaroj la ĉina registaro atingis rimarkindajn sukcesojn en regado de la loĝantara kresko karakterizatajn per drasta malleviĝo de la natura kresko de la loĝantaro. En 1970 la loĝantaro nature kreskis je 2.592%, dum en 1979 je 1.166%.

La supre menciitajn sukcesojn oni ŝuldas al la diversnivelaĵoj registaraj institucioj, kiuj donis grandan atenton al la naskolimigo. En 1971 oni restarigis la naskolimigan oficejon sub la Ŝtata Konsilantaro. En la "Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko" aprobita en marto 1978 estas skribitaj la vortoj "la ŝtato kuraĝigas kaj praktikas naskolimigon". Tio estas la unua fojo ke la naskolimigo aperis en la ŝtata leĝo post la fondo de la nova Ĉinio. En 1980 fondiĝis la Ŝtata Komisiono pri Naskolimigo. Ankaŭ la lokaj registaroj sur la provinca, municipa, aŭtonom-regiona kaj gubernia niveloj ĉiu starigis sian samcelan oficejon. En ĉiu kampara popolkomunumo kaj ĉiu urba loĝkvartalo laboras profesia aŭ neprofesia prizorganto.

Dum sia propagando pri naskolimigo tiuj prizorgantoj prezentis al popolanoj la fakton, ke la loĝantara kresko dum la pasintaj 20-30 jaroj kaŭzis malfacilegon al konstruado de la lando kaj ĝia ekonomia disvolviĝo, kaj komprenigis al ili, ke la regado de la loĝantara kresko koncernas la longperiodajn interesojn de la ĉina nacio. Ili ankaŭ klarigis la rilatojn inter la naskolimigo kaj la virina liberiĝo, faris kalkulojn kaj komparon kaj per tio montris al vilaĝanoj, ke regado de la loĝantara kresko malebligas reduktion de

la po-kapa agrokvanto, sed altiĝas la meznombra enspezo kaj helpas la disvolvon de la kolektiva ekonomio kaj plibonigon de la familia vivo. Dank' al ilia propagando la vilaĝanoj konscie praktikas naskolimigon.

Ekde la 70-aj jaroj la ĉina registaro komencis meti la laboron regi la loĝantaran kreskon en la ŝtatan ekonomian planon. Dum ellaborado de jara aŭ kvinjara plano ĝi konsideras ne nur la disvolvon de la materia produktado, sed ankaŭ la kreskon de la loĝantaro por venki la blindan kutiman kreskon de la loĝantaro kaj la de tio kaŭzitan kontraŭdiron inter la laŭplana materia produktado kaj la senplana kreskigo de loĝantaro.

### **RIMEDOJ POR REGI LA LOĜANTARAN KRESKON**

En sia propagando pri naskolimigo, la ĉina registaro faris ĉefe persvadon kaj alprenis laŭeble iujn ekonomiajn rimedojn por mildigi la kontraŭdiron de naskolimigo inter la ŝtato, kolektivo kaj individuo.

Nuntempe la edukado de la borforto bezonas malmulte da mono en la ĉina kamparo, kaj mankas al la maljunuloj socia asekuro, tial ilin vivtenas ĉefe iliaj gefiloj, kaj pro tio la vilaĝanoj volas multe da infanoj por siaj estontaj familiaj interesoj. Por ŝanĝi tian situacion, la diversaj lokoj de Ĉinio kuraĝigas malfruan geedziĝon kaj malfruan naskon kaj premias geedzan paron, kiu havas nur unu infanon. Ekz-e, oni donas subvencion por la sano de la infano kaj favoras unue solfil(in)on en la ricevo de vartado, edukado, kuracado kaj laborposteno. Oni havigas loĝdomon al solfil(in)o en urbo kaj dom-

bazon kaj parcelon por privata uzo al tiu en kamparo tiom, kiom du infanoj ricevas. Oni pliiĝas la garantion de la socia vivo al la maljunuloj. Oni donas pension ĝenerale al la urbaj funkciuloj kaj laboristoj, kiam ili forlasis sian oficon pro maljuneco kaj per pli multa pensio favoras la emeritojn kiuj ne havas fil(in)on aŭ havas unu fil(in)on. Pro tio ili malpli zorgas pri sia vivo. En la kamparo la maljunuloj havas socian garantion en malsamaj gradoj. En bonhavaj produktaj brigadoj la maljunuloj vivas el sia pensio. En la mezriĉaj oni starigas maljunulejon por trankviligi la vivon de la seninfanaj maljunuloj. En la malriĉaj oni materie helpas la maljunulojn en ilia vivo. Se tio estas malfacila por brigadoj, la ŝtato donas al ili certan subvencion.

Por laŭplane bridi la naskon, diversaj lokoj senpage liveras preventilojn kaj senpage praktikas abortigan kaj steriligan operaciojn. Oni donas plenan laborpagon al la operaciitoj en ilia kelktaga ripozo.

Efikis la supraj rimedoj, kiuj daŭre antaŭenigos nian laboron regi la kreskon de la ĉina loĝantaro. Ĉinaj kuracejoj ankaŭ traktas nenaskipovulojn. En la regiono de nacimalplimulto oni alprenis rimedojn utilajn al ilia nacia prospero. Oni aktive studas kaj propagandas eŭgenikon kaj faras periodan korpan ekzamenon al la gravedulinoj. Tio estas ankaŭ farenda samkiel la laboro de laŭplana naskolimigo.

---

\* La aŭtoro estas estro de la Instituto pri la Teorio de Loĝantaro sub la Ĉina Popola Universitato.

# Naskolimigo en Ĉinio

—*Intervjuo kun Chen Muhua, prezidanto de la Ŝtata Naskolimiga Komisiono de Ĉinio*



Chen Muhua

Nemalmultaj el niaj legantoj demandis nin pri la naskolimigo de Ĉinio. Ĵurnalisto de Novaj-agentejo Xinhua intervjuis la prezidanton de la Ŝtata Naskolimiga Komisiono Chen Muhua pri la nombro de la ĉina loĝantaro kaj la naskolimigo. Sube estas la demandoj de la ĵurnalisto kaj ŝiaj respondoj.

**Demando:** Kiom nombras la ĉina loĝantaro?

**Respondo:** Statistiko en la fino de 1980 konstatis, ke la nombro estas 982,550,000. Ĉi tiu sumo plus la loĝantaro en Taiwan jam superas miliardon. La totala sumo okupas 22 procentojn de la monda loĝantaro.

**D:** Kiom da infanoj naskiĝas ĉiujare en Ĉinio?

**R:** En 1979 naskiĝis 17,000,000 infanoj, 10 milionojn pli malmulte ol en 1970.

**D:** Kiaj estas la naskokvanto, mortokvanto kaj pliiĝokvanto de la loĝantaro de nia lando?

**R:** En 1979 la naskokvanto estis 1.79 procentoj; la mortokvanto estis 0.62 procento, kaj la pliiĝokvanto estis 1.17 procentoj.

**D:** Kion celas la ĉina naskolimigo?

**R:** Ĉinio estas socialisma lando kaj havas planekonomion, kaj tio postulas, ke generado de la homoj, samkiel produktado de materio, estu farata laŭplane, por ke kresko de la loĝantaro kongruu kun kresko de la nacia ekonomio.

Ni ne nur praktikas naskolimigon por bridi la kreskon de la loĝantaro, sed ankaŭ propagandas eŭgenikon. Ni volas, ke niaj posteuloj estu disvolvitaj morale, mense kaj korpe kaj estu utilaj por la socialisma konstruado. Nia naskolimigo proponas al geedzoj havi nur unu infanon. Se iuj geedzoj vere havas malfacilojn, ili ricevas permeson havi duan infanon. Sed tria estas rigore malpermesita. La politiko pri naskolimigo ne estas tiel severa por nacimalplimulto. Ni klopodas, por ke en la fino de la nuna jarcento la loĝantaro de Ĉinio ne superu 1.2 miliardojn.

**D:** Kiajn metodojn Ĉinio alprenis por bridi la kreskon de la loĝantaro?

**R:** La metodoj estas diversaj. Oni faras vastan propagandon pri naskolimigo, por ke la popolo konsciis la gravecon pri naskolimigo kaj memvole prak-

tiku ĝin. Ni laŭdas malfruan geedziĝon kaj malfruan naskon kaj admonas, ke ĉiu geedza paro havu nur unu infanon. La ŝtato liveras senpagajn preventilojn kaj donas senpagan steriligan operacion. Steriligitoj ricevas apartan ripoztempon sen salajra dekalkulo, kaj operaciotoj-kampanoj ricevas laborpoentojn dum la ripozo.

**D:** Kiel oni stimulas la geedzojn naski nur unu infanon?

**R:** La ĉefa metodo estas propagando. Kaj cetere oni ellaboris konkretajn premiajn metodojn laŭ la lokaj kondiĉoj. Ekzemple, en urboj, fabrikoj, minejoj kaj oficejoj, la ŝtato donas al la oficistoj kaj laboristoj sumon da mono por ilia solinfano; aŭ senpage akceptas solinfanojn en infanvartejon kaj lernejon aŭ donas senpagan kuracon; aŭ longigas la ripoztempon por akuŝintino de solinfano. En la kamparo oni donas al akuŝintino de solinfano subvencion kaj favoras ilin en dividado de terparcelo por privata uzo aŭ dividado de tero por domkonstruado.

**D:** Kiom da geedzoj aprobis la alvokon "naski nur unu infanon"?

**R:** Ĝis junio 1981, dekono de la naskipovaj promesis ne havi duan infanon.

**D:** Kiajn metodojn de naskolimigo oni aplikas en Ĉinio?

**R:** En Ĉinio oni ĉefe prenas preventon kiel la ĉefan. Multaj gravediĝopreventaj metodoj estas diskonigataj kaj la naskipovaj geedzoj decidas laŭplaĉe la metodon.

**D:** Kiajn preventajn metodojn oni plej volas?

**R:** Kampanoj ŝatas enute-rajn preventilojn aŭ aliajn simplajn kaj efikajn metodojn. La naskipovaj en la urboj ĉefe volas kondomojn aŭ preventajn medikamentojn buŝe preneblajn. Parto de ili preferas ekstere efikan medikamenton.

**D:** Ĉu en Ĉinio oni volas ligaturon?

**R:** Troviĝas diversaj metodoj por preventi gravediĝon, kaj oni mem elektas preferatan metodon. Oni ne neprigas ligaturon al geedzoj havantaj nur unu infanon. Sed en iuj lokoj, oni proponas ligaturon al tiuj, kiuj jam havas du infanojn kaj malfacile sukcesas preventi gravediĝon.

**D:** Kiajn lecionon kaj sperton oni elĉerpis el la klopodo por naskolimigo?

**R:** Naskolimigo estas granda afero por ŝanĝi moron, kaj la persvado kaj admonado estas tre penigaj. En Ĉinio la feŭda penso "viro estas pli digna ol virino" ankoraŭ estas tre populara kaj por ŝanĝi tian penson oni devas propagandi kaj admonadi longtempe. En tio ni jam akiris certan sukceson. Sed tio estas tute nova por ni, kaj cetere ni ankoraŭ ne havas sufiĉan sperton; iuj kamaradoj estas


krudaj, malpaciencaj kaj neatentemaj dum propagandado, kaj ĉio ĉi vekis plendojn. Ni devas korekti niajn erarojn por fari la informadon pli efika.

**D:** Ĉu troviĝas bastardoj en Ĉinio?


**R:** Jes, sed malmultaj. La ĉinoj estas seriozaj pri seksaj interrilatoj, kaj seksaj rilatoj antaŭ geedziĝo estas riproĉataj de la publika opinio. La Geedza Leĝo de Ĉinio difinas, ke eksteredzecaj infanoj estas protektataj. Ili povas esti vivtenataj de la naskintoj aŭ de aliuloj.

**D:** Ĉu la naskolimigo validas ankaŭ por nacimalplimulto?


**R:** Ĉinio estas unueca lando kun multaj nacioj. Ĝenerale parolate, ankaŭ nacimalplimulto devas praktiki naskolimigon. Sed la konkretaj principoj estas diversaj inter malsamaj nacioj. Rilate al la malmultnombraj nacimalplimulto, la ŝtato helpas ilin multigi la membrojn. Inter la nacioj multnombraj en dense loĝataj regionoj, la ŝtato praktikigas naskolimigon, sed la konkretaj difinoj estas ne tiel severaj kiel por la han-nacianoj.



- \* Pawel Jonkisz (21-j. studento) dez. kor. tutmonde pri sporto, turismo, muziko kaj historio, 93-236 Lodz, ul. Kruczkowskiego 11m. 51, Pollando.
- \* Ilona Venturova (54j. frizistino), ĈS-37005-Ĉeske Budějovice, str. Vodnanska 7-Vltava-Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi kun gees-istoj el Kanado aŭ Aŭstralio.
- \* Yladiŝlav Joviĉ, Veterinaro Svetozara Markovica 20, Yu 18000 Niŝ Jugoslavio, deziras korespondi kaj interŝanĝi p.m. kaj b.k. kun gesamideanoj el la tuta mondo.
- \* Mi nomiĝas Nicolas kaj estas sportema knabo dekjara. Mi serĉas korespondant(in)on de Finnlando. Nicolas Grandjean, Rue du Midi 13, CH 2052 Fontainemelon, Svislando.
- \* Gintaras Ziaunys, Str. Zemaitijos 9-25, SU-235500 Mazeikiai, Lito- vio, USSR, dez. kor. kun ĉina esperantisto.
- \* Petro Rychlewski, ul. Al. Wyzw, 283/2, D8-440, Pilawa, Pollando, dez. kor.
- \* Grazyna Barszczewska, ul. Bialostocka 25, 16-010 Wasilkow, Pollando, dez. kor. tutmonde.
- \* Irana esperantisto deziras korespondi tutmonde pri ĉiu temo precipe pri muziko, Alireza Kargarpur, P.O. Box 431, Karaj, Iran. Jen lia foto.









En la Tria Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso la ĉina teamo gajnis la ĉampionecon per venko en ĉiuj sep konkursoj. Jen ili en la premiada ceremonio.

# LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO GAJNIS LA MONDAN ĈAMPIONECON





Sun Jinfang, gajninto de premioj de plej bona sportisto, elstara ludisto kaj transdonisto






Zhang Rongfang




Zhou Xiaolan


Ĉefatakisto Lang Ping frapas pilkon.



Cao Huiying



Yang Xi




Zhu Ling






Lang Ping, gajninto de premio de elstara ludisto



Chen Yaqiong



Chen Zhaodi

Yuan Weimin, gajninto de premio de plej bona trejnisto



Liang Yan



Zhang Jieyun



Zhou Lumin





Triunfa reveno al Beijing

# LA VOJO DE LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO AL LA MONDA ĈAMPIONECO

**F**INIĜIS la Tria Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso. La ĉina teamo gajnis ĉiujn sep matĉojn kaj estis honorita per la ĉampioneco. Tio estas la unua venko gajnita de ĉinaj virinoj en la mondskalaj korbopilka, flugpilka kaj piedpilka konkursoj. Ĉi tiuj sportoj disvolviĝis relative malrapide en Ĉinio, tial la venko per si mem starigis plian mejloŝtonon en la ĉina sporta historio.

## ASPIRO AL LA ĈAMPIONECO

Antaŭe, kiam oni demandis la membrojn de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo: "Kio estas via celo?", ĉiu el ili same respondis: "Gajni la ĉampionecon!"

La ĉina teamo studis la ludarton kaj trajtojn de la fortaj teamoj en la mondo kaj ellaboris serion da strategioj kaj taktikoj, laŭ kiuj ili sin trejnadis kaj pruvis sian lertecon en la konkurso. Ĉu en varmega somero, ĉu en frosta vintro, ĉiuj membroj ŝvitege trejnadis sin, strebante al bona rezulto. Tial ilia ludarto kaj taktiko rapide progresis.

La Ĉina Virina Flugpilka Teamo gajnis la sesan lokon en la Oka Monda Flugpilka Ĉampioneca Konkurso en Moskvo en 1978 kaj la duan lokon en la Oka Azia Sportkunveno en Tajlando samjare.

En la Dua Azia Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso en Hongkongo en 1979 la ĉina teamo unuafoje gajnis la azian ĉampionecon venkinte la teamojn japanan, sud-korean k.a.

En 1980 por atako kaj defendo la ĉina virina teamo fariĝis pli kaj pli kapabla. Per siaj sukcesoj en internaciaj konkursoj ĝi akiris ĉiam pli grandan reputacion, kaj estis honorita kiel unu el la kvin plej fortaj teamoj en la mondo. (La aliaj kvar estas la japana, usona, kuba kaj sovetunia. — *Trad.*)

La 30-an de oktobro 1981 la ĉina virina teamo kun aspiro al la ĉampioneco transiris la maron al Japanio por partopreni la Trian Mondpokalan Virinan Flugpilkan Konkurson.

En la nomita konkurso kolektiĝis la elitaj teamoj de la mondo. Tiam estis diversaj supozoj pri tio, kiu gajnos la ĉampionecon. La japana teamo penis daŭre teni la ĉampionecon, dum la usona, sovetunia kaj kuba teamoj strebis gajni ĝin. Sed multaj opiniis, ke la ĉina teamo havas la plej grandan eblecon atingi la ĉampionecon. Faktoj pruvis, ke la ĉinaj knabinoj ne malesperigis sian patrujon, ili venkis sinsekve en sep matĉoj dum la dek tagoj kaj gajnis

unuafoje la mondan ĉampionecon.

## TRAJTOJ DE LA ĈINA TEAMO

Ne estas hazarde, ke la ĉina teamo superis la sovetunian, japanan kaj kuban teamojn en la monda flugpilka rondo. La kaŭzo de ĝia sukceso kuŝis ne en la naturdotitaj kondiĉoj, nek en ia ajn talismano. "Eĉ fera stango fariĝos kudrilo, se oni senĉese ĝin frotados." El tiu ĉina proverbo venis la sperto de la ĉina virina teamo.

La matĉoj montris, ke ĉiuj ĉinaj teamanoj estas elstaraj, preskaŭ egale eminentaj. Ili estis lertaj en atako, en defendo kaj en kontraŭatako kaj harmoniaj en kunagado. Ili atakis jen forte, jen rapide. Rilate la defendon, la antaŭaj ludantoj povis formi striktan blokadon, dum la malantaŭaj kapablis tutforte savi danĝeran pilkon.

Kun transdonisto Sun Jinfang kiel sia kerno, la ĉina teamo formis serion da kolektivaj taktikoj rapidmovaj kaj variemaj. Sur la ludkampo la sportistinoj atakis unu post alia. Se ili ne povis mortigi la pilkon per forta frapo, ili faris rapidan atakon. Se ne sukcesis la atako en difinita posteno, ili martelege batis dum kurado. La usona, japana,



sovetunia kaj kuba teamoj havas elstarajn frapistojn, ekz. Flora Hyman, Rita Crockett, Mercedes Perez, Yokoyama, Ekami kaj aliaj, tamen en la kolektiva forto la ĉina teamo evidente superas ĉiun el ili.

La sukcesa retoblokado de la ĉina teamo estis unu el la plej gravaj rimedoj por ricevi poentojn en la konkurso. La ĉinaj sportistinoj bone blokadis dank' al sia salto-alteco kaj ludarto, kio havigis al ili evidentan superecon en la matĉoj kun la kompare malaltkreskaj teamoj japana kaj sud-korea, kaj ankaŭ estas taŭga por vetludi kun la altkreskaj teamoj kuba, usona kaj sovetunia. En la konkurso kun la usona teamo la ĉinaj ludistoj ricevis 19 poentojn sole per blokado, dum la usona nur 11 poentojn. En la konkurso kun la sovetunia la ĉinaj ludistoj ricevis 15 poentojn per blokado, dum la sovetunia nur 4 poentojn. La ĉina teamo estas karakterizita per rapida movo, akurateco, harmonio en kunagado kaj alta salto en blokado.

Alia kaŭzo de la ĉina venko estis, ke ili malofte faris erarojn. En matĉo oni ofte renkontas resenditan pilkon. Se la animstato de la ludistoj estas nestabila en la ŝlosila momento de streĉa matĉo, ili ofte faras erarojn, kaj tion oni povas eviti nur dank' al siaj lerteco kaj sperto. En la matĉo inter la sovetunia kaj ĉina teamoj la antaŭa mem faris erarojn kaj pro tio perdis 11 poentojn, dum la lasta nur unu poenton, kio ja metis fundamenton por la ĉina venko. En la kvin ludoj inter la ĉina kaj usona teamoj la antaŭa perdis 10 poentojn, dum la lasta 22 poentojn.

La ĉina teamo estis kapabla rapide akomodigi al abruptaj

ŝanĝoj sur la ludkampo. En malavantaĝaj cirkonstancoj la ĉinaj sportistinoj sin tenis trankvile kaj aplombe por strebi al venko. Ĉar la usona teamo havas unuaklasajn frapistojn kiaj F. Hyman kaj R. Crockett, kiuj havas mar-telecan batmanieron, ili ofte metis la ĉinan teamon en pasivecon. Precipe F. Hyman per sia alta kaj rekta frapo de sur la 4-a posteno gajnis multajn poentojn. Tion alfrontante, la ĉina teamo rapide reguligis sian defendpozicion kaj ordonis Cao Huiying kaj Zhou Xiaolan rekte bloki la de ŝi frapitan pilkon. Se eble, la tri antaŭaj ludantoj samtempe saltis por bloki, dum unu ludanto en la malantaŭo penis rebati la pilkon sur la 1-a posteno. Tio malfavoris la frapojn de F. Hyman kaj devigis ŝin ŝanĝi sian taktikon, nome frapi oblikve, kio estis facile defendebla kaj multe reduktis ŝian potencon. Dum la matĉo kun la japana teamo, ties stabila defendo kaj efika savo de la danĝeraj pilkoj kaŭzis, ke la ĉina teamo malofte efikis per sia rapida atako, sed tiam la fortega frapo de Lang Ping ja rikoltis bonan sukceson. Ŝiaj pilkoj trafis je 62.3% kaj per tio ŝi gajnis 17 poentojn, kiuj fariĝis decida faktoro por gajni la finan venkon.

Sian venkon Ĉinio ŝuldis ankaŭ al la ĝusta komando de

trejnisto Yuan Weimin. La rapida maturiĝo de la ludarto kaj taktiko de la ĉina teamo rezultis el lia multjara penado. Apud la ludkampo li komandis aplombe, decideme kaj trankvile. En la konkurso liaj decidoj bone efikis, li ankaŭ ĝuste elektis la ludantojn, pro kio li estis honorita per la titolo "la plej bona trejnisto".


## PEZA TASKO EN LA ESTONTECO

En la estonteco la virina flugpilkado disvolviĝos ĉefe en alteco, rapideco kaj forteco. Pli kaj pli intensiĝas la batalo super la reto kaj en la ludado aperas karakterizaĵoj kiel en la vira flugpilkado. Tial la ludo ekhavis novajn postulojn de alteco, rapideco, variemo, retoblokado, defendo, unuafoja transdono, serviro, korpaj kondiĉoj de la ludistoj kaj ties volo kaj taktiko.

La ĉina virina teamo bone ludis en la Tria Mondpokala Konkurso, sed aperis en la matĉoj iuj ĝiaj mankoj, ekz. multaj eraroj en la unuafoja transdono de pilko kaj nestrikta defendo de la malantaŭaj ludantoj.

Rigardante la Mondan Flugpilkan Ĉampionecon Konkurson en 1982 kaj la Olimpikojn en 1984, la ĉina virina teamo nepre devas penegi kaj strebi por denove gajni honoron.


*La du poŝtmarkoj emisiitaj de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio por celebri, ke la Ĉina Virina Flugpilka Teamo gajnis la ĉampionecon en la Tria Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso*





# Printempo ĉiam restu ĉe ni

—Pri la media protektado  
de la Kemi-industria  
Kompanio de Lanzhou



*En korto de iu fabriko*

**S**UR mapo de Ĉinio, oni facile trovas, en la nordokcidenta parto de Ĉinio, grandan urbon situantan ĉe la fervoja kruciĝo — Lanzhou. Tiu altebenaĵa antikva urbo sur la pasinta fama “Silka Vojo” havas historion de pli ol dumil jaroj. En Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) ĝi portis la nomon Jincheng (en la ĉina lingvo tio signifas “oran urbon”). Nun ĝi estas la ĉefurbo de la provinco Gansu, grava trafika centro en nordokcidenta Ĉinio kaj jam iom post iom disvolviĝis en petrol-kemian industrian urbon kun sufiĉe granda skalo. Sed Lanzhou estas ankaŭ unu el la ĉinaj urboj trafitaĵ de serioza atmosfera polucio.

Por ekkoni la staton de ĝia media protektado, mi speciale veturis al Lanzhou. Mi, “provizora loĝanto”, maltrankvilis same kiel la lokaj loĝantoj, sed ankaŭ vidis novajn esperon kaj perspektivon. Eble la Kemi-industria Kompanio de Lanzhou plej profunde impresis min.

Ĝi estas grandatipa petrol-kemia kombino, kiu produktas kemian sterkon, sintezan kaŭĉukon, plaston, kemiajn fibrojn k.a. Ĝia konstruado ko-

menĉiĝis en 1952 kaj ĝiaj fabrikoj komencis produktadon ekde 1958. Ĝi havas pli ol 36,000 personojn, naŭ fabrikojn, unu institucion por kemi-industria projektado, unu kemi-industrian instituton, unu aŭtomatig-esplo- ran instituton kaj unu instituton por kemi-industriaj ekipaĵoj.

La ĉefaj instalaĵoj de la kompanio estis aĉetitaj el Sovetunio, okcidenta Germanio kaj Britio. Ili estas produktaĵoj kun la teknika nivelo de la kvardekaj ĝis la sesdekaj jaroj, kaj la teknologio estas relative postĝinta. La duobliĝo de la produktokvanto de la kompanio estis gajnita per necesaj plikonstruoj, teknika renovigo kaj prifoso de latentaj fortoj. Ekz. la jara produktokvanto de sinteza kaŭĉuko pliiĝis de 15,000 tunoj al 40,000 tunoj, kvar kvinonoj de la investo por la superplanaj produktaĵoj estis ŝparitaj. La specoj de produktaĵoj pliiĝis de 38 al 98. En 1980 ĝiaj ses specoj de produktaĵoj estis ekspertizitaj de la Kemi-industria Ministerio kiel bonkvalitaj, kaj du specoj el ili ricevis arĝentajn medalojn de la ŝtato. Ekde 1979 dek tri specoj

el ĝiaj produktaĵoj iris en la internacian merkaton.

La produkta procedo estas tia, ke parto de la materialo transformiĝas en produktaĵojn, dum la cetera fariĝas senutilaĵoj kaj revenas en la naturon. En la pasinteco iuj strebis sole al rapida produktado, kontraŭ la natura ekologia ekvilibro, kaj neglektis konstrui kontraŭpoluciajn instalaĵojn. Ili prenis la atmosferon kaj riverojn kiel malkarajn ŝuteĵojn de forĵetaĵoj, kio kaŭzis al la medio gravan polucion, perturbis la ekologian ekvilibron kaj serioze minacis la sanon de la popolo. Tiuflanke la Kemi-industria Kompanio de Lanzhou havas multajn lecionojn.

Post la Tutlanda Mediprotekta Konferenco kunvokita en 1973, tiu problemo fine estis prezentita en kunveno de la gvidantoj de la kompanio. Iufoje ĝiaj koncernaj gvidantoj venis al alta loko iom fore de ĝiaj fabrikoj kaj vidis densan fuman nebulon super la fabrikoj, kiu eĉ kovris la sunon. Ĉu tie estis la loko kie ili vivis kaj laboris? Ili estis forte skuitaj de tio kaj ekkonsciis, ke la problemo estas tre grava.

Kiam mi venis al la loko, mi ne vidis plu la fumplenan ĉielon. Promenante en ĝiaj fabrikoj dekoraciitaj per arbaroj kaj belaj koreopsoj, mi sentis kva-zaŭ ke mi venus en parkon.

35-jara laborantino, kun modesta kaj serena personeco tipa ĉe la virinoj de norda Ĉinio, akompanis min dum la vizito. Ŝi senĉese atentigis min: "Fakte tio estas nia unua sukceso en la mediprotekta laboro, multaj problemoj ankoraŭ atendas solvon. . ."

Ili ja akiris ĝojgajn sukcesojn. Ĝis nun la Kemi-industria Kompanio de Lanzhou konstruis 24 instalaĵojn por protekti la medion, plenuminte tri tempolimitajn objektojn difinitajn de la ŝtato, ses de la provinco kaj dek difinitajn de si mem.

Por tio la kompanio fondis mediprotektan oficejon rekte sub la kompania direktoro kaj ankaŭ ĝiaj fabrikoj starigis mediprotektajn sekciojn. Por efike protekti la medion per esploro kaj kontrolo, ĝi fondis mediprotektan instituton. Tiuj fondaĵoj formas medikontrolan reton kun la kontrolstacio de la kompanio kiel la centro; ili periode kolektas kaj analizas specimenojn por koni la atmosferan kaj akvan polucion.

Enketo pri la deveno de la

malpurigo estas antaŭkondiĉo por redukti polucion. Ili faris 12 specialajn enketojn per diversaj metodoj kaj akiris grandan kvanton da materialoj pri la kvantoj de eluzitaj akvo, gaso kaj skorio ellasitaj de la fabrikoj. Surbaze de tio ili ellaboris projekton por protekti la medion.

La instalaĵoj de nitroza acido de la kemisterka fabriko ĉiuhore ellasis 180,000 kubmetrojn da eluzita gaso de nitroza acido, kies enteno de nitrogena oksido multe superis la limigon difinitan de la ŝtato, tial tio fariĝis unu el la ĉefaj objektoj en reduktado de la malpurigo. La kemisterka fabriko kaj la mediprotekta instituto faris multajn esplorajn laborojn. La novaj instalaĵoj por redukti polucion oficiale ekfunkciis en marto 1980, kaj dank' al tio la procentoj de nitrogena oksido en la ellasita gaso malleviĝis ĝis sub la ŝtata limigo.


Ĝia instalaĵo por trakti eluzitan akvon povis ĉiutage trairigi nur 10,000 tunojn, kaj ankoraŭ granda kvanto da uzita akvo estis ellasita sen traktado en la Flavan Riveron. Ekde 1978 la kompanio komencis pligrandigi la instalaĵon, post kio ĝi ĉiutage povos trakti 50,000 tunojn da uzita akvo kaj per tio bridos la malpuriĝon de la Flava Rivero.

Sinteza utiligo kaj polucireduktado rilatas unu al la alia. La refojaj cirkuligo kaj utiligo de uzitaj ebligas maksimuman utiligon de materialo kaj samtempe malpliigas polucion. La instalaĵoj de la kompanio por sinteza utiligo de la bruligebla gaso tra kompresoroj kaj tuboj povas ĉiuhore cirkuligi 3,300 kubmetrojn da gaso al la fabrikoj kiel iliaj hejtajoj.


Samtempe kun ĉio ĉi ili plantis en la lastaj du jaroj 450,000 arbojn, faris pli ol 200 florbedojn kaj ok florajn forcejojn. Iu maljuna laboristo de la sintezkaŭĉuka fabriko estas fervora pri la verdiga laboro. Post plurjara klopodo li kaj la membroj de la verdiga taĉmento faris florajn forcejojn, elkulturis pli ol 40 specojn da floroj en pli ol 300 potoj kaj plantis 24,000 arbojn. Unu emerita laboristo de la movoforta fabriko, kune kun aliaj laboristoj, konstruis etan ĝardenon kun rokaĵo, florbedoj, fontano kaj kiosko en antikva stilo, kiuj formas belan ripozejon.

Kiam ni preterpasis la kompanian infanĝardenon, rigardante la vigle ludantajn infanojn, mia akompanantino subite diris al mi: "Mi havas du infanojn; ni ja devas krei por ili bonan medion."

*Kolektado de atmosfera specimeno*



*Cisterno por trakti malpuran akvon*



CAI MAO:

## En la Beijing-a Magazeno



**L**A movoplena strato Wang-fujing tre proksima al Tiananmen-placo estas unu el la famaj komercaj stratoj de Beijing (Pekino). Ĝi estas strato ne longa kaj portas nur iom pli ol cent pordonumerojn, sed ĉiuj konstruaĵoj ĉe la strato estas preskaŭ senescepte vendejoj de diversaj varoj. Kaj tie sin trovas unu el la kvar grandaj ĉiovendaj magazenoj de Beijing, nome la Beijing-a Magazeno.

Iumatene, starante ĉe la orienta pordo de tiu magazeno, mi observis la homotorentojn en-kaj elirantajn la grandan vendon.

“Ĉio estas havebla ĉi tie!” diris admire juna virino ŝajne el alia provinco, irante el la magazeno.

“Vere,” diris kun rideto maljunulino iranta apude, “raviĝis miaj okuloj!”

Post trarigardo de la vendejoj en tiu granda magazeno okupantaj plankareon de 12,600 kvadrataj metroj, mi konstatis, ke la vortoj de tiuj du virinoj ne estas troigaj. Kvankam la domo estas nur ses-etaĝa, tamen en la tri malsupraj etaĝoj vendiĝas ĉiaj vivbezonaĵoj, kiel vestoj, kotonaj, silkaj, lanaj kaj artafibraĵoj, diversaj fabrikaĵoj por ĉiutaga uzo, malgrandaj metalaĵoj, elektraj aparatoj kaj instrumentoj, metiartaĵoj, vinoj, cigaredoj, kukoj, bombonoj, kosmetikaĵoj, skribiloj, paperoj, kajeroj ktp. ktp. Kaj ne malproksime de la magazeno funkcias ĝia filio sur Chang'an-strato, kie vendiĝas televidiloj, magnetofonoj, elektraj fridujoj, bicikloj kaj kudromaŝinoj.

La domo de la magazeno, ekipita per klimatiziloj, aspektas bela kaj impona pro siaj latunaj pordegoj, marmoraj kolonoj kaj

elektraj iluminaĵoj. Ĉiutage de duono post la oka ĝis duono post la dudeka ĝi akceptas pli ol cent mil klientojn, kaj pli multe en festotagoj. Iam kaj tiam iuj vendotabloj estas ĉirkaŭataj de pluraj vicoj da homoj kaj unu komizo devas samtempe servi dekelkajn klientojn. La komizoj rapide kaj ĝentile servas la klientojn unu post alia, prenante kaj pakante por ili la deziratajn objektojn kaj kalkulante la pagojn. Du komizoj de la sekcio por infanaj vestaĵoj diris al mi, ke ili vendis 800 knabajn jaketojn en 90 minutoj.

Mi venis al la sekcio por lanaj ŝtofoj en la tria etaĝo. Tie montriĝas 450 specoj de diversaj lanaj ŝtofoj kaj pli ol 1,000 specoj de lanaj konfekciaĵoj por viroj kaj virinoj. La respondeculo de tiu sekcio, Qu Jinpei kaj Tian Wanchun, diris al mi, ke tie antaŭ dekelkaj jaroj, la kotonaj



ŝtofoj havis debiton, ĉar ili estis pli malmultekostaj ol la ŝtofoj kemifibraj kaj estis preferataj de homoj kun relative malgranda enspezo. Sed hodiaŭ la kotonaj teksaĵoj malfacile vendiĝas. Nun oni preferas ŝtofojn el mezlongaj fibroj kaj longaj poliesteraj fibroj, kiuj estas pli kostaj, tamen ankaŭ pli elegantaj kaj fortikaj. Lanaj ŝtofoj, antaŭe rigardataj kiel altklasaj ĉe ni, okupas ĉiam pli grandan lokon en la konsumado de la ordinara laboruloj. Statistiko montras, ke de januaro ĝis septembro en 1981 la Beijing-a Magazeno vendis pli ol 550,000 metrojn da lanaj ŝtofoj, pli ol 859,000 metrojn da silkaĵoj kaj pli ol 345,000 konfekciaĵojn el lanaj ŝtofoj.

Ankaŭ bicikloj, brakhorloĝoj, kudromaŝinoj kaj televidiloj havas grandan debiton. Antaŭe en la magazeno oni vendis biciklojn nur de kelkaj specoj, sed nun en ĝia filio 36 specoj de bicikloj estas prezentataj. Tie vendiĝas 11 specoj de kudromaŝinoj por familia uzo. Krom diversaj mekanikaj horloĝoj, tie montriĝas ankaŭ elektronikaj brakhorloĝoj de la kvara generacio, kiuj povas montri ne nur la horojn, minutojn kaj sekun-

dojn, sed ankaŭ la tagojn de la semajno kaj la monatojn. Antaŭ kvin jaroj televidiloj estis rigardataj kiel luksaĵoj, sed nun ankaŭ kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Beijing ilin aĉetas. Lavmaŝinojn Ĉinio komencis produkti iom malfrue, kaj tamen ili estas varme akceptataj. La 1-an de oktobro 1981 la magazeno forvendis cent lavmaŝinojn bonkvalitajn en kelkaj horoj.



En notlibro speciale elmetita de la magazeno por kolekti opiniojn kaj kritikojn de la klientoj, iu kliento skribis: "La Beijing-a Magazeno estas ne nur vendejo, sed ankaŭ ekspozicio pri la disvolviĝo de nia tekstila industrio." Montrante al mi tiun noton, iu maljuna komizo diris, ke li opinias ĝin vere trafa. Li diris al mi, ke la Beijing-a Magazeno vendis nur 6,000 specojn de varoj, kiam ĝi komencis sian funkcion en 1955, sed hodiaŭ jam preskaŭ 30,000 specojn. Ĉiujare ĝi povas vendi varojn kun totala valoro super ducent milionoj da juanoj. 99 procentoj de la vendaĵoj estas produktitaj en nia lando.

Komercante, oni kompreneble devas zorgi pri gajno de profito, tamen mi rimarkis, ke laŭ la

principo de sia entrepreno la Beijing-a Magazeno konsideras antaŭ ĉio plenumon de la bezonoj de la klientoj. Ekzemple, iufoje la stoko de sapoj, termosojoj kaj papero ne estis sufiĉa, aĉetistoj de la magazeno pene serĉadis novajn liverantojn de la varoj kaj rapide kovris la mankon. Alia ekzemplo pri ĝia bona servo estas ĝia vendado de kudriloj unuopaj, sola folio de papero, ŝakpeco, ŝuo aŭ ŝtrumpo, pecetoj de ŝtofo por flikado kaj lozaj kosmetikaĵoj, kio povas havigi al ĝi neniam aŭ nur malmulte da profito, tamen povas plenumi la bezonojn de la amasoj. Sufiĉe vasta estas tia servo ĉe la magazeno.

Por kontentigi la bezonojn de klientoj, la Beijing-a Magazeno disponigas al la publiko kartojn por noti mankantajn varojn kaj per tio solvis multajn malfacilojn de klientoj. Ekzemple, iu infanĝardeno de Beijing skribis en sia dankletero al la magazeno: "Por celebri la Internacian Infanan Feston, nia infanĝardeno urĝe bezonis serion da perkutinstrumentoj kaj tamen ne sukcesis aĉeti eĉ unu malgraŭ serĉado en multaj vendejoj. Iutage ni rimarkis ĉe vi la kartojn por noto de mankantaj va-

*En la teretaĝa vendejo*



roj kaj registris niajn bezonaĵojn. Tiam ni apenaŭ havis esperon de sukceso, sed ne longe poste vi jam sciigis nin, ke ni iru al vi por preni la bezonaĵojn. Vere bona estas tiu karto donita de vi!”

“Tutkore servi al la klientoj” estas la devizo de la personaro de la magazeno.

Ĉe la sekcio por manĝaĵoj laboras veterana komizo Zhang Binggui, kiu eklaboris kiel mizera lernoknabo en privata manĝajvendejo en la malnova Ĉinio. En 1955 li fariĝis komizo en la Beijing-a Magazeno. En la pasintaj 26 jaroj li servis kun spirito de mastro de socialisma entrepreno, al ĉirkaŭ 2,200,000 klientoj kaj neniam kverelis kun iu ajn el ili, kaj rikoltis laŭdojn kaj estimon de la aĉetantoj. Li estis elektita kiel popola reprezentanto (kiel parlamentano en la eŭropaj landoj) de la Tutlanda Popola Kongreso kaj membro de ĝia Konstanta Komitato.

En la tago, kiam mi vizitis la magazinon, mi vidis svarmon da homoj ĉe la vendotablo por sukeraĵoj—Zhang servis. La amaso tie staranta deziris ne nur aĉeti bombonojn, sed ankaŭ rigardi la prestiĝan labormo-

delon kun medalo. Aŭdiĝis flustroj en la amaso: “Jen estas Zhang Binggui!”

“Rigardu, lia mano estas pe-silo preciza.”

“Kiel li rapidas, kaj kun varma afableco vere kortuŝa.”


Tiam iu virino kun knabineto en la brakoj venis por aĉeti bombonojn, tamen ŝi devis atendi sian vicon. La knabineto ekploris kaj kriis por bombono. Zhang Binggui prenis pecon de sukeraĵo kaj metis ĝin en ŝian manon. La knabineto tuj ĉesigis la ploradon. Zhang diris al la virino: “La koston de la bombono mi kalkulos poste.” La patrino danke balancis sian kapon. Poste, kiam ŝi aĉetis bombonojn, Zhang prenis unu pecon el la pesitaj bombonoj kaj ĝin remetis en la bombonkestegon, metis kelkajn el la bombonoj en saketon kaj ŝovis la bongustaĵojn en la poŝeton de la infano. Li pakis la ceterajn kaj transdonante la paketon al la kliento, li diris: “Ŝi havu kelkajn pecojn en sia poŝo por ĝui survoje.” La emociita virino diris al sia infano: “Danku la avon!” Kaj la infano diris naive kaj dolĉe: “Avo!” Tion aŭdinte, ĉiuj ĉeestantoj amuziĝis kaj ridetante laŭdis

Zhang pro lia bona zorgo pri la infano.


Kvankam Zhang jam fariĝis eminenta popola reprezentanto, tamen li ankoraŭ laboras kiel ordinara laborulo. Krom ĉeestado de kunvenoj de la Popola Kongreso, li servadas la klientojn en sia sekcio. Nun inter la 2,400 laborantoj de la Beijing-a Magazeno, precipe la junaj oficistoj, iras aktivado por “fari civilizacian komercon kaj ĝentilan servadon al la klientoj” kaj floras ĉe ili la spirito de Zhang Binggui.

Kompreneble la laboro de la nomita magazeno ja ne estas senmanka. Ĝia administranto Meng Xianyuan diris al mi, ke ili ankoraŭ devas multe plibonigi sian servadon, koncerne al deca sinteno de la komizoj. Iliaj varoj ankoraŭ ne povas plene kontentigi la kreskantajn bezonojn de la klientoj. Vere ankaŭ mi aŭdis grumblojn de klientoj pri neaĉetebleco de famaj kaj malmultekostaj varoj. Sed Meng diris kun plena memfido, ke certe belan perspektivon havos la produktado de porkonsumaj varoj, sekve de senĉesa plibonigo de nia ekonomio kaj la sufiĉa gravigo de la agrikulturo kaj malpeza industrio, la Beijing-a Magazeno faros ankoraŭ pli grandan kontribuon por plenumi la diversajn bezonojn de la klientoj.

*Montra fenestro de la magazeno*



*Aĉeto de littuko*







## La bela kaj fekunda lago Songhua

de ZHOU YUCHEN

**L**A urbo Jilin situanta ĉe Songhua-rivero de nordorienta Ĉinio havas belan nomon "Nord-landa Riverurbo". Ĝi havas multajn pejzaĝojn kaj vidindaĵojn, inter kiuj troviĝas Beishan-monto kun originala belo, la majesta Longtan-monto, la ĉarma Jiangnan-parko k.a. Sed la plej alloga estas la lago Songhua. Tiuj, kiuj venis al Jilin, ĉiuj volas ĝui ĝian pejzaĝon, same kiel tiuj, kiuj venis al la urbo Guilin de Guangxi, volas ĝui la pejzaĝon de Lijiang-rivero kaj tiuj, kiuj venis al Hangzhou de Zhejiang, certe volas viziti la Okcidentan Lagon.

La lago Songhua troviĝas ĉ. 30 kilometrojn sudoriente de Jilin. Ĝi antaŭe estis rivera regiono. En la komenco de la kvardekaj jaroj, post kiam oni tie konstruis la barajon de la Hidroelektrejo Fengman, formiĝis tie la granda artefarita lago. Ĝi havas areon de 550 kvadrataj kilometroj, kun longeco de pli ol 200 kilometroj kaj maksimuma larĝeco de ĉ. dek kilometroj. Dum inunda periodo, kiam oni malfermas la kluzon de la barajo, la akvo falas malsupren de la loko 91-metrojn alta, kio levas ondojn altajn je dekoj da metroj,

kiuj en sunlumo vidigas ĉielarkon.

La lago sin trovas en la regiono de la urbo Jilin, la gubernioj Yongji, Jiaohe kaj Huadian. La kvietaj kaj bela medio ĉirkaŭ la lago estas bona loko por turismo kaj sanigo. Bordas la lagon du grandaj sanatorioj kun relative perfektaj ekipaĵoj. Kiam oni veturas kontraŭ la fluo per motorboato, freŝa vento karesas la vizaĝon, la belaj pejzaĝoj kvazaŭ serio da pentraĵoj sin prezentas antaŭ la turistoj, de tempo al tempo akvobirdoj pepante ekflugas rompante la kvietecon, fiŝkaptaj velŝipoj senbrue glitas sur la akvosurfaco. Plu antaŭen, la lago fariĝas pli larĝa, ambaŭbordaj gruzejoj jam ne videblas kaj vidiĝas nur krucaĵoj. La ĉarmaj montpintoj speguliĝas en la akvo kaj moviĝetas. La lago havas malsaman ĉarmon en la kvar sezonoj. Printempe floras pompe diversaj floroj, somere prosperas ĉie la verdaj arboj kaj vintre la montoj sin vestas arĝente. Estas plej menciinda ĝia aŭtuna pejzaĝo. Tiam la ĉielo fariĝas pli serena, pli pura kaj la ĉirkaŭlagaj montoj fariĝas pli ĉarmaj. Post aŭtuna prujno verdaj frondoj de salikoj kaj betuloj apud la lago ore koloriĝas, la folioj de aceroj kaj kverkoj ruĝiĝas. Ili kune kreas serenajn kaj ĉarman aŭtunpejzaĝon.

En la lago troviĝas insuleto, kies formo similas al kvin kaŭrantaj tigroj. Ĝi estas bona loko por bano kaj pikniko. Se oni kelkope tie banas sin kaj poste piknikas, tio ja estas bela ĝuo.

La supra parto de la lago troviĝas en la gubernio Huadian. De tie irinte antaŭen dekojn da kilometroj, oni vidas la plej

grandan hidroelektrejon sur la rivero Songhua — la Hidroelektrejon Baishan streĉe konstruitan. Ĝia baraĵo longas 670 metrojn kaj altas 149.5 metrojn. Laŭ la projekto ĝi povos produkti 900,000 kilovattojn da elektro en la unua periodo. Post la finkonstruo ĝi formos duan artefaritan lagon sur la rivero Songhua.

La lago estas bela kaj fekunda. Ĝi abunde produktas fiŝojn, kiel karpoj, mandarenaj fiŝoj kaj blankaj fiŝoj. La blanka fiŝo pezas maksimume dek kelkajn kilogramojn, ĝia viando estas delikata kaj blanka. La vapormita blanka fiŝo estas fama bongusta plado. Sur la 270,000-hektaraj montoj ĉirkaŭ la lago kreskas densaj arbaroj, de kie ĉiujare oni elportas grandan kvanton da ligno al diversaj lokoj de la lando. La loko estas unu el la gravaj produktoj de la tri trezoroj de Jilin — ginsengo, zibela felo kaj cerva junkorno. La ŝtato, komunumoj kaj brigadoj fondis tie nombron da cervaj kaj zibelaj bredejoj kaj ginsengaj kulturejoj. Zibelo estas katforma kaj ĝia felo estas malpeza, mola kaj tre valora. Oni diras, ke fruktoj volvitaj per ĝia felo restas freŝaj kaj bongustaj post plurtaga tenado ekstere en temperaturo minus 30°C. El ĝia felo oni povas fari altklasan peltan veston, tial ĝi ĝuas tre altan takson tra la mondo. En la montaj arbaroj ĉirkaŭ la lago vivas nigraj ursoj, aproj, kapreoloj kaj fazanoj, pro kio la loko estas ŝatata de ĉasantoj. Krome, tie la montaj pteridoj (*Pteridium aquilinum*), osmundoj (*Osmunda japonica*), nigraj orelfungoj kaj hemerokaloj (*Hemerocallis flava*) estas tre famaj, nutroriĉaj kaj ŝatataj en kaj ekster Ĉinio.





La bela lago  
*Songhua*

Fotoj de ZOU QICHENG kaj  
HUA YING



Betuloj


En forsto





La bela lago

Arbaro en aŭtuno







FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

Meznokta suno ĉe  
Tromso, Norvegio

de **J. GIESSNER**  
(FR Germanio)



Vintro en Ales-  
sandria

de **EMMA**  
**SOTTOTETTI**  
(Italio)



## “Ornitologia Doktoro”

de ZHOU YUCHEN

**E**STIS majo de 1981 kaj ĉarma printempo gastis ĉe Changbai-montaro. Ekkreskis helverdaj folioj sur arboj, sovaĝaj floroj eligis delikatan aromon kaj migraj birdoj alflugis de malproksime grupo post grupo. Tiam pliintensiĝis la laboro de Zhao Zhengjie, ornitologo de la rezervejo de Changbai-montaro. Iun tagon, kiam Zhao Zhengjie laboris en eksperimenta ĉambro, leterportisto donis al li poŝtkarton adresitan de iu okcident-germana ornitologo. En ĝi la germano skribis, ke li esperis akiri lian artikolon pri la esploro pri bonazioj de Changbai-montaro, publikigitan en la “Zoologia Gazeto”.

Zhao Zhengjie estis plurfoje tiel petita. Li tenas interrilatojn kun alilandaj ornitologoj kaj esploraj institucioj. En iuj leteroj oni respekte nomis lin doktoro.

Zhao Zhengjie havas bonan reputacion ankaŭ ĉe siaj enlan-

daj kolegoj. Nun li estas konsilanto de la Ĉina Ornitologia Asocio. Oni intime nomas lin ornitologia doktoro.

La 43-jara Zhao Zhengjie naskiĝis en malgranda monta gubernio de norda Sichuan (Sichuan)-provinco. En 1949, kiam fondiĝis la respubliko, li ĵus diplomiĝis el elementa lernejo. Zhao Zhengjie kun vigla karaktero ekŝatis animalojn jam en sia infaneco. Ĉu birdoj flugantaj en la ĉielo aŭ fiŝoj naĝantaj en akvo vekis ĉe li grandan intereson. Kiam li studis en la biologia fakultato de la Sichuan-a Universitato, li verkis disertaĉiojn “Birdoj kaj Fiŝoj — Bonaj Animaloj por Bredo” kaj “Enketo pri Fiŝoj en Minjiang-rivero” ktp. En 1959, post kiam Zhao Zhengjie diplomiĝis el la nomita universitato, li esperis iri al loko kun malbonaj vivkondiĉoj por okupiĝi pri biologia esplorado. Sed li estis sendita al la Centra Forst-administracio

por administri la ĉasaferon, kaj tial, en tiu periodo, li havis la oportunon enketi la primitivajn arbarojn de nordorienta Ĉinio. La senlimaj arbaroj, riĉaj fontoj de animaloj kaj vegetaloj, kaj la simplaj montanoj profunde impresis lin, kaj plifirmiĝis lia decido dediĉi ĉion al biologio. Precipe post kiam Zhao Zhengjie estis informita, ke fondiĝis la unua rezervejo de Ĉinio en Changbai-montaro, li petis permesi al li esplori birdojn en Changbai-montaro. Marton de 1962 lia peto estis konsentita.

Ne estis hazarde, ke Zhao Zhengjie elektis Changbai-montregionon por esplori birdojn. Ĉinio fondis tie rezervejon kun areo de 210,000 hektaroj, la plej grandan en la lando. Tie la primitivaj arbaroj estas densaj, la specoj de animaloj kaj vegetaloj tre multaj, la natura medio kaj la bionologia sistemo pli kompletaj; kaj la tieaj geologio, topografio, klimato, grundo,

faŭno kaj flaŭro havas originalajn trajtojn de montregiono. Ankaŭ la montpintoj, arbaroj, lagoj, kaskadoj kaj termofontoj havas originalajn karakterizaĵojn. La loko estas perfekta natura muzeo kaj paradizo por sovaĝaj animaloj. Ĉiun printempon, multaj migraj birdoj tien alflugas de malproksime por generi idojn. En la pli ol 200 specoj de birdoj en Changbai-montaro, pli ol 100 specoj estas migraj birdoj. Ilia belsona trilo kaj buntaj plumoj aldonis al Changbai-montaro vivecon kaj ĉarmon. Tien veninte, Zhao Zhengjie ekhavis la ĝojon de birdoj reflugintaj en arbaron. Li dediĉis sian tutan energion al la ornitologia esplorado.

Tiutempe, la rezervejo ĵus fondiĝis kaj havis nur tri simplajn kabanojn malproksimajn de loĝantoj kaj neatingeblajn de aŭtobuso. La laboraj kaj vivaj kondiĉoj estis tre malfacilaj. Precipe en la longa vintro, la tero kovriĝas de glacio kaj neĝo, kaj la temperaturo falis ĝis 40°C sub nulo. Portante pel-tajn surtuton kaj gantojn, Zhao Zhengjie, kiu vivis de sia infaneco en suda Ĉinio, eĉ ne povis teni manĝilojn pro frostoj. Informiĝinte pri tio, lia antaŭa gvidanto en Beijing (Pekino) skribis al li, ke li revenu al Beijing. Zhao Zhengjie danke rifuzis la prizorgon de tiu ĉi gvidanto. Li venkis ĉiajn malfacilojn kaj senĉese progresis en sia scienca esplorado. Edifate de lia sindediĉa spirito, lia edzino Zhang Shuhua, instruistino de elementa lernejo, venis de la granda urbo Changchun al la montaro kaj laboris kiel instruisto. Helpate de sia edzino li laboris pli diligente. Eĉ en festoj kaj ferioj li laboris en laboratorio kaj observaj lokoj. La 15-a

de la oka monato laŭ la ĉina lunkalendaro estas festotago por kuniĝo de familianoj. Sed por ne interrompi la esploradon li ankoraŭ observis en montaro. Pro tio, lia edzino devis piediri al li kun lunaj kukoj simbolantaj familianan kunvivon, por paŝigi kune kun li la feston.

Pro manko de avangardaj ekipaĵoj, en esplorado Zhao Zhengjie observis ĉefe per siaj korporganoj krion, aktivadon, generadon, kutimon, trajton kaj dislokiĝon ktp. de la birdoj kaj esploris interrilatojn de la birdoj kun arbaro kaj la homaro. Estis ne facile akiri fruktojn sub tiaj kondiĉoj. La mandarena anaso (*Aixgalericulata*) estas speco de raraj dekoraciaj birdoj, kiun la ĉinoj deantikve rigardas simbolo de amo kaj feliĉo. Ili vivas en la orienta, meza, suda kaj sudokcidenta partoj de Ĉinio. En sia genera sezono ili transflugas al montaj arbaroj de nordorienta kaj norda Ĉinio kaj ĉefe la Changbai-montaro. La informoj pri ĝia vivado en la mondo estas fragmentaj. Antaŭe oni ne sciis, kiel generas tiuj sovaĝaj birdoj. Por malkaŝi la misteron en generado, Zhao Zhengjie kaj liaj tri kolegoj observis en la arbaro du jarojn. Frumatene, kiam ankoraŭ brilis la steloj kaj ankoraŭ ne vekiĝis la montoj kaj la arbaro, ili sin kaŝis en arbedoj apud rivereto por ekkoni la krion de mandarenaj anasoj kaj serĉis iliajn nestojn laŭ la krioj. Ili ofte estis tramalsekigitaj de roso, kaj dum tiu tempo moskitoj estis precipe abomenindaj, kiuj dolore pikis al ili la vizaĝon. La nestoj de mandarenaj anasoj troviĝas sur arbegoj. Por koni iliajn ovometadon kaj kovadon, Zhao Zhengjie kaj liaj kolegoj plurfoje grimpis sur arbojn en

unu tago. Ili ŝvitegis kaj terure laciĝis per grimpado sur kelkdek-metrajn arbojn senbranĉajn. Sed tamen la malfaciloj ne haltigis Zhao Zhengjie kaj liajn kamaradojn. Post atenta observado ili finfine malkovris la misteron de la generado de mandarenaj anasoj. Ili trovis, ke la birdoj metas ovon ne ĉe akvo nek en rokfendoj, sed en kavernoj en altaj tremoloj. Estas interese, ke la ĵus eloviĝintaj mandarenaj anasidoj forlasas la neston, antaŭ ol ili povas flugi. Pro la heredeco pri enakva vivo la anasidoj akvosopiraj, baldaŭ post eloviĝo, saltas de sia nesto en akvon por vivi tie. Zhao Zhengjie kaj liaj kamaradoj analizis la fenomenojn kaj verkis la artikolon "Pri la Genera Biologio de Mandarenaj Anasoj", kiu estis bone taksita de fakuloj en kaj ekster Ĉinio.

La ĉina merĝo (*mergus*) estas tre rara speco de birdoj malofte vidata kaj vivas ĉefe en Ĉinio. Eĉ ornitologoj malofte kaptis ĝin kaj nur malmultaj naturaj muzeoj en la mondo havas ĝiajn specimenojn. Oni tre malmulte konas ĝian generadon kaj vivadon. Dum la observado pri mandarenaj anasoj Zhao Zhengjie trovis, ke Changbai-montaro estas genera loko ankaŭ de la ĉinaj merĝoj kaj ties generado tre similas al tiu de mandarenaj anasoj. Poste, li kaj liaj kamaradoj verkis artikolon "Ekologia Esplorado de Ĉinaj Merĝoj".

Zhao Zhengjie faris observadon kaj esploradon ankaŭ pri la vivo de aliaj raraj birdoj kaj verkis pli ol 30 disertaciojn, el kiuj iuj estis legitaj en tutlandaj simpozioj. Lastatempe, li jam finis la animalan parton de



la libro "Arbaro de Jilin". Aliaj du libroj "Birdoj de Nordorienta Ĉinio" kaj "Birdoj de Changbai-montaro" estas verkataj de li kaj Fu Tongsheng, fama ĉina ornitologo kaj profesoro de la Nordorienta Normala Universitato.

La esplorado de Zhao Zhengjie estis alte taksata de la ŝtato, kaj la koncernaj institucioj ofte sendis lin al aliaj lokoj por esplori aŭ al tutlandaj akademiaj konferencoj. Liaj piedsignoj troviĝas en la Malgranda Xing'an-montaro de la Nordoriento, sur la Birda Insulo de Qinghai-provinco, ĉe Dianchilago de Yunnan-provinco kaj Taihu-lago de Jiangsu-provinco en orienta Ĉinio. En junio de 1980, Zhao Zhengjie, kiel membro de la Enketa Grupo pri Natura Protektado kaj Prizorgado de Sovaĝa Animalo sendita de la Ĉina Forst-administracio, flugis al Aŭstralio kaj Novzelando. Dum la restado en la landoj li trovis, ke la du landoj donas grandan atenton al la protektado de birdoj, kaj la lernejoj ofte edukas la lernantojn protekti la naturon. Tie sur stratoj aŭdiĝas trilo de birdoj. Post reveno, li skribis artikolon "Paradizo de Birdoj" por siaj samlandanoj.

Li diris al mi, ke la birdoj estas amikoj de la homaro, ili protektas la arbarojn, beligas la medion, riĉigas la kulturan vivon de la homaro kaj portas belon al la homaro. Esploro pri la birdoj estas tre interesa. Estonte, krom fari ornitologian esploron li fotos ankaŭ rarajn birdojn, por ke pli da homoj povu vidi ilian aktivadon.

Ilustrita de CHEN MUYUAN



*Zhao Zhengjie kaj liaj kolegoj observas bestajn spurojn sur neĝo.*



*Zhao Zhengjie kolektas birdan specimenon.*

# Por servi al la laborantaj geedzoj

## EKDE IU FAMILIO

Vespere de frua aŭtuno en la pasinta jaro mi vizitis iun familion en Dongcheng-distrikto de Beijing (Pekino). Min akceptis ĝia mastrino Zhang Jinglin, kiu estas universitata instruistino. Ŝi donis lecionon pri kemio al studentoj antaŭ kelkaj horoj kaj nun preparas pladojn, portante antaŭtukon kaj manikŝirmilojn. La ĉambreto estas kvieta: ŝia edzo ankoraŭ ne revenis hejmen de laboro, forestas ankaŭ ŝiaj infanoj. Informiĝinte pri mia intenco, ŝi tuj ekparolis aplombe:

“Mia ĉiutaga vivo komenciĝas je kvardek minutoj post la kvina, kiam mia vekhorloĝo sonoras. Je la sesa mi revenas kun ĵus frititaj farunaĵoj el la servejo, funkciigata de la loĝantara komitato. Tiam mia edzo jam vestas nian filinon sesjara kaj ordigas la litaĵojn. Post matenmanĝo, je duono post la sesa, li veturas al la Kemiindustria Instituto por labori kaj samtempe akompanas ŝin al elementa lernejo apud la instituto. Nia 13-jara filo Fengfeng legas fremdlingve duonon da horo post matenmanĝo kaj iras al la lernejo je la sepa. Post ilia foriro mi lavas manĝilaron kaj ordigas la ĉambron, aŭskultante novaĵdisaŭdigon. Poste mi legas fakajn librojn aŭ studas fremdan lingvon dum 20 minutoj. Je kvardek minutoj post la sepa mi eldomiĝas kaj atingas

mian oficejon post dek minutoj. Ni komencas labori je la oka. Jen mia streĉa mateno.

“Tagmeze mia edzo kaj filino manĝas en la instituta manĝejo. Antaŭe, kiam Fengfeng estis asidua al la elementa lernejo, li ĉiam manĝis en la malgranda manĝejo funkciigata de la loĝantara komitato, sed lastatempe li trapasis la ekzamenon por eniri mezlernejon kaj komencis manĝi en ĝia manĝejo. Nia instituto situas tre proksime de nia domo. Kiam mi iras hejmen, plenuminte mian antaŭtagmezan laboron, mi survoje aĉetas legomojn por la vespera manĝo. Mi tagmanĝas simple kaj poste mi kutimas kuŝi en lito dum duonhoro.

“Post la tuttaga lernado Fengfeng faras hejmotaskon kaj preparas rizaĵon. Prepari pladojn kompreneble estas mia afero. Post vespermanĝo, ni kutime rigardas programerojn pri novaĵoj antaŭ la televidilo. Duonhoron poste mia edzo kontrolas la hejmotaskon de Fengfeng kaj helpas lin en lia lernado de fremda lingvo. Teksante lanveston mi urĝas nian filinon fari hejmotaskon kaj prepari la lecionojn por la sekvanta tago. Ĉirkaŭ la naŭa ambaŭ infanoj enlitiĝas. Mia edzo preparas lecionon aŭ okupiĝas pri radioreciviloj. Niaj televidilo, radiorecivilo, tablolampo kaj sonkesto ĉiuj ja estas faritaj de li. Lastatempe ni anstataŭigis per kolora televidilo la de li fari-

tan nigra-blankan, kiun ni uzis kvar jarojn. Kaj krome vespere mi devas lavi vestojn por niaj infanoj. Se estas ankoraŭ libera tempo, mi legas librojn pri kemio. Ni ambaŭ enlitiĝas ĝenerale je duono post la deka aŭ je la dek-unua.

“Ordinare mankas al niaj infanoj tempo por sin amuzi. Tial je festo aŭ dimanĉo mi ofte kune kun ili promenas en parko, aŭ vizitas ekspozicion pri kaligrafio kaj desegno, tiamaniere pasigante duontagon. Somere ilin plej plezurigas naĝado kune kun la patro.

“Kvankam ni estas okupataj, tamen ĝojaj. Estas domaĝe, ke estas tro temporaba la dommas-trumado, kio malhelpas nin lerni kaj ripozi. Lastatempe la koncernaj departementoj estas tre interesitaj pri la socialigo de la mastrumaj laboroj por malpezigi la ŝarĝon de la laborantaj geedzoj. Nia loĝantara komitato jam starigis multajn servojn. La vestolava stacio lavas por ni litokovrilojn kaj litotukojn, postulante de ni malmulte da pago, kio estas por ni granda oportunaĵo.”

## SOCIAJ SERVOJ

Familioj kia tiu de Zhang Jinglin troveblas ĉie en la ĉinaj urboj. En la kvartalo Zhongfangli, kie ŝi loĝas, estas 1,300 familioj, kies plejparto konsistas el laborantaj geedzoj. Tiaj fa-



milioj havas pli multajn maloportunajojn en la ĉiutaga vivo ol iuj aliaj. Ekzemple, ili matene ne havas tempon por prepari manĝon kaj ankaŭ tagmeze ili ne povas fari tion por siaj infanoj-lernantoj. Al ili ankaŭ mankas tempo por fari alispecajn dommastrumajn laborojn. Por faciligi la vivon por la laborantaj geedzoj, la tiea loĝantara komitato en la pasintaj ses jaroj starigis nombron da servaj punktoj. Ĉiuj servantoj estas pliaĝaj dommastrinoj, emeritoj aŭ gejunuloj kiuj ne havis oficialan laboron antaŭe. La bezonata mono, inkluzive de la salajro de ĉiuj servantoj, devenas el la enspezo de la fabrikoj, kiujn la komitato funkciigas. Dum mia vizitado mi rigardis plurajn servejojn.

La malgranda manĝejo kun kvar laborantoj pretigas tagmanĝon speciale por la lernantoj, al kies familio mankas manĝopreparanto. Nun ĉe ĝi nutras sin 40 etuloj, ĉiu el kiuj pagas ĉirkaŭ ses juanojn por ĉiumonata manĝokosto. Tuj post la antaŭtagmeza lernado, la etuloj gaje alkuras tien. Vokante, ke la etuloj lavu siajn manojn kaj sidigu, avino Fan portas al ili freŝajn rizaĵon kaj pladojn. Ŝi apudstaras kaj rigardas ilin kun rideto. Se ŝi trovas, ke iu lernanto perdis apetiton, ŝi tuj demandas, ĉu li febras aŭ jam prenis manĝeton, ĉu la manĝaĵoj ne estas appetitvekaj aŭ lia instruisto riproĉis lin pro malsukceso en ekzameno. Poste ŝi akurate sciigas tion al liaj gepatroj. Se iu forestas, ŝi portas la manĝaĵon al lia hejmo. Pro ĉio ĉi ŝin kore dankas ĉiuj gepatroj de la lernantoj. Hu Qiong estas laboristino de fabriko en la malproksima ĉirkaŭurbo de Bejing; ŝia edzo estas universitata

instruisto. Ili ambaŭ estas tre okupitaj. Ili tagmeze ne povis prizorgi sian solfilon kaj donis al li monon, por ke li manĝu en restoracio. Sed tiu aŭ aĉetis per la mono manĝetaĵon aŭ perdis ĝin. De tiam, kiam ekestis la malgranda manĝejo, li ne plu prenas manĝeton. Nun li lernas en supera mezlernejo kaj manĝas tie kiel antaŭe.

Post lernado la eksterlerneja helpa punkto zorgas pri ilia lernado. La direktorino Li Shuyuan ĉiam postulas antaŭ ĉio, ke la geknaboj plenumu hejmotaskon, kaj poste permesas ilin ludi ŝakon, pilkon kaj fari aliajn amuzajojn. En someraj kaj vintraj ferioj la helpa punkto fariĝas ilia amuzejo. La direktoroj organizas ilin por fari aeroplanajn modelojn, kajtojn aŭ metiartaĵojn, kondukas ilin al botanika ĝardeno kaj muzeo, kio

interesas la geknabojn kaj trankviligas iliajn gepatrojn.

En Ĉinio multaj laboristoj kaj oficistoj biciklas al sia laborejo. La nomita loĝantara komitato instalas du bicikloparkojn en la korto. Tial oni ne plu bezonas porti sian biciklon en la etaĝdomon. La komitato starigis ankaŭ vestolavan kaj kudran staciojn, kaj medicinan servon kun pli longigita labortempo. En la helaj tagoj, matene survoje al laborejo oni kunportas malpurajn vestaĵojn en la vestolavejon kaj reportas ilin purigitajn post la laboro. La kudrostacio kudras rapide kaj kontentige, ĉiutage ĝi prenas sur sin multe da laboroj. Ĝi ankaŭ tajlas por aliaj. Se iu en la korto fariĝas malsaneta, li ne bezonas viziti hospitalon, ĉar sanitaristo de la korta medicina servo portas al li medikamentojn.

*Servo de kudro kaj lavado funkciigata de loĝkvartala komitato*





## HELPEMULOJ

Krom starigi diversajn servojn, la komitato ankaŭ pledas por reciproka helpo inter najbaroj. La maljunulino aŭ emerito ofte funkcias kiel bona prizorganto de la harmoniaj familioj. La laborantaj geedzoj restigas al ŝi (aŭ li) la ŝlosilon de sia domo antaŭ iro al laboro. Ifoje, kiam ili ne havas sufiĉan tempon matene, la "prizorganto" portas la infanon al infanvartejo. Tagmeze la "prizorganto" zorgas ke la lernantoj-geknaboj dormu.

La kadroj de la kvartala komitato estas des pli korinklinaj al la loĝantoj. La supre menciita pli-ol-70-jara avino Fan havas sep gefilojn. El ŝiaj gefiloj kaj bofiloj estas vicurbestro, inĝeniero kaj kuracisto, kiuj ĉiuj konkure petas, ke ŝi pasigu siajn lastajn jarojn ĉe ili. Sed ŝi volonte servas al ĉiuj loĝantoj

en la kvartala komitato. Ŝi estas okupata de mateno ĝis vespero: ŝi servas kiel kontoregistranto por la malgranda dratfarejo, kolektas laktokoston por la laktovendejo, zorgas pri la lavmaŝinoj en la vestolava stacio, helpas pruntedoni librojn en la malgranda biblioteko kaj tagmeze flegas la infanojn ĉe ilia manĝado en la malgranda manĝejo. La 51-jara Li Shuyuan estas pensiata je pli ol 50 juanoj ĉiumonate, ŝia edzo estas instruisto kaj ŝia plej juna filo — triaklasa laboristo. Krom helpi lernantojn de elementa kaj meza lernejoj tage, ŝi gvidas ankaŭ helpan kurson por diplomitoj de la supera mezlernejo kaj skribas instruajn notojn per stencilo por ili vespere. La 55-jara Zhang Xiuzhen estas vicestrino de la komitato. Ŝia edzo estas vices-tro de departemento en la Ministerio de Malpeza Industrio. Ĉiuj ŝiaj ses gefiloj havas la-

borojn. Ŝi, kiel oficiala kadro de la komitato, kvankam ricevas ĉiumonate subvencion nur de 30 juanoj, tamen ŝi estas fervora por vartado de infanoj aŭ solvado de la familiaj konfliktoj. En profunda nokto ŝi observas en la korto, ĉu iu forgesis deponi sian biciklon, ĉu iu ne portas la sunumitajn vestojn hejmen, kaj akurate rimarkigas tion al la mastro. Kiom da penado ŝi faras kune kun ĉiuj aliaj kadroj de la komitato, por ke ĉiuj gelaborantoj laboru trankvile!

Bone diris Zhang Jinglin: "Kvankam en nia vivo estas multaj malfaciloj, tamen la maljunulino de la najbaro ĉiam prizorgas nin, tion faras ankaŭ la kadroj de la komitato kaj la tuta socio. Kiam mi pensas pri ĉio ĉi, mi sentas min varma en la koro kaj la mastrumadon pli malpeza."



*Lernantoj prenas tagmanĝon en malgranda manĝejo funkciigata de loĝkvartala komitato.*



*Geknaboj en eksterlerneja studrondo*

WAN ZHI:

## Neĝopluva nokto

(Novelo)



*“Ne, mi ne bezonas.”*

**L**AŬ mia neklara memoro tie estis aŭtobusa haltejo. Jes, ĝuste tie, kie staras la virino, sub la pale brilanta stratlampo. Malrapide mi proksimiĝas al ŝi por demandi kaj certiĝi pri tio.

“Ne, mi ne scias,” ŝi respondas krude, levante la kapon kaj rigardante min kun timo. Pro kio ŝi estas tiel flamiĝema? Muĝas la vento en la malluma nokto. Neniu iras sur la strato, kaj krome ŝi ja estas virino. Mi ekridetas maldolĉe. Kie estas la haltejo? Damne! Eĉ ne estas signotabulo por ĝi! Mi scias nur, ke la nokta aŭtobuso pasas tra tiu ĉi loko.

La haltejo certe estas ĉi tie. Mi devas saĝe vidi, ke ŝi ja ne povas stari ĉi tie senkaŭze. Do ankaŭ mi devas resti ĉi tie. Lasu ŝin koleri aŭ timi, tamen mi ja ne ofendos ŝin.

Ŝi staras malproksime de mi, trans la lampo. Estas malvarme. La nokto, fulge malluma, englutas la lamplumon, malfortigante kaj paligante ĝin. Regas profunda aŭtuno. Raŭke kantante la velkaj folioj ruliĝas antaŭen sur la pavimo. Eble pluvos, aŭ neĝos. La vento estas humida kaj frostiga. Mi kunportas ombrelon, mi devas iri al loko malvarma.

Jam longan tempon mi ne estis eksterdome en tia profunda nokto, precipe ne sola. La nokto tenas homojn en la karesanta hejmo. La hejmo, kiu ilin regas per varmo, per amo, per feliĉo. Kien mi vagas? Pri tio ankaŭ mi mem ne estas certa. Verŝajne mi iras por feliĉo kaj amo.

Ankoraŭ ne videblas aŭtobuso. La ŝoforo nun eble sidas apud forno por sin varmigi. Ĉe bela fajro kaj kun vino en tia profunda nokto. Sed mi havas nur la ombrelon kaj malplenajn poŝojn.

Mi komencas paŝi malrapide tien kaj reen. Post ĉiu deko da paŝoj mi min returnas kaj levas la kapon por rigardi al la stratfino, sed malesperas ĉiufoje. Poste mi levas la kapon post ĉiu duo da ir-reiroj. “Mi ne rigardos ĉi-foje. Mi rigardos post tri duoj da ir-reiroj, kaj certe tiam la buso venos.” Sed nenio montriĝas. Mi plilongigas la tempon kvinoble, dekoble, sed ankaŭ vane. Kiel interese! Tia estas mia vivo. Kun la espero mi silente paŝas tien kaj reen. En la komenco mi levis la kapon post nur ĉiu deko da paŝoj por rigardi, ĉu la espero realiĝas aŭ ne, kaj iom post iom mi plilongigas la tem-

pon. Fine mi nur paŝas silente, tamen ankoraŭ kun espero.

Mi pensas, ke la espero finfine realiĝos, ĝuste kiel venos la aŭtobuso, kiu finfine transportos vin tien, kie estas la loko, kiu psike apartenas al vi jam de longe. Kie ajn ĝi moviĝas, ĝi nun iras al vi. La vivo estas tia. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne ricevis amon, espereble fariĝos amantoj kaj amatoj. Jam de longe ekzistas via amanto kaj amato, kiu proksimiĝas al vi, kie ajn tiu sin trovas. Ĉe la stratfino brilas lumoj de aŭto, kiu baldaŭ atingos nin. Bedaŭrinde estas ŝargaŭto. La ŝoforo, kvazaŭ tute ne vidinte nin, fulmrapide kondukas la ŝargaŭton for. Mi malesperiĝas. Ankaŭ ŝi veas pro malespero.

La vento furiozas plue. Malvarma strio falas sur mian vangon. Ekpluvas. La pluvo falas, miksiĝinte kun neĝo, en tiu obskura nokto de profunda aŭtuno.

Mi malfermas la ombrelon por ŝirmi min kontraŭ la pluvneĝeroj. Jen tie staras ŝi, la malafabla virino, kiu sin trudas en

miajn pensojn. Ŝia vizaĝo kaj ŝia malmilda paroltono. Kial la homoj ne fidas unu alian? Ĉu inter ili devas esti nur malkonfido, timo kaj singardemo? Alfrontante ŝin, mi ne povas preteratenti, ke tie ne estas ŝirmejo kontraŭ pluvo; tie staras sole nudaj stangoj de elektraj dratoj, arboj kaj malaltaj sentegmentaj muroj. Mi volas etendi la ombrelon al ŝi. . .

“Ne, mi ne bezonas,” ŝi rifuzas kategorie per voĉo tremanta de malvarmo. Ŝi estas juna kaj laŭmode vestita, sed timema. Min tiklas la demando, “Kial vi timas?” Ĉu nur pro tio, ke estas neĝoplueva nokto?

“Nu, vi sola uzu la ombrelon! Mi ne toleras, ke vin duŝu la pluvo.”

“Ne, mi ne bezonas.”

“Do ankaŭ mi estu duŝata.”

Ni, paro da gejunuloj, finfine subombreligās senvorte, dum pluvos kaj neĝas. La neĝeroj kaj pluveroj falas teren murmurante kaj disbloviĝas per la vento. Denove regas netrapenetrebla mallumo ĉe la stratfino.

La ombrelon mi movas laŭeble al ŝia flanko. Ĝi estas tro malgranda, nur por unu persono. Mi etendas ĝin laŭeble al ŝia flanko sen tuŝi ŝin.

“Ne, ne zorgu nur min.”

“Proksimiĝu al mi!”

Ŝi ĵetas rigardon al mi, ŝajne nun ŝi ekkonfidas min.

La nokto vekas singardemon en la homoj. Tiam oni sin defendas per rigliloj, seruroj, strikte fermitaj fenestroj kaj rigardas ĉion per la larĝe malfermitaj okuloj. Tamen ĝi ankaŭ interkonfidigas la homojn per la koro, la spirado kaj la brilaj oku-

loj, eĉ en tiu neĝoplueva nokto, malgraŭ ke ni estas fremdaj unu al la alia. Nur hodiaŭ mi ekkomprenas, kial oni bezonas malluman nokton. Estus neimageble, se estus nur tago, kaj ne estus nokto.

Ni staras mutaj. Ni interŝanĝas neniun vorton plue. Mi scias, ke post la disiĝo ni fariĝos ree nekonatoj. Kial do diri plu? Ni estas nur kunvojaĝantoj kaj niaj vojoj kruciĝas nur ĉe la aŭtobusa haltejo en nokto neĝoplueva. Mi ne scias, kiu ŝi estas aŭ kien ŝi iras. Sed ŝi ekkonfidas min. Ŝia konfido donas al mi tiun ĝojon, kiu estas neakirebla

en la tago. Estus bele, se mi vivus eterne en tia nokto, pluva kaj neĝa.

Ĉe la stratfino aperas lumoj de aŭto trapenetrantaj la nebulon de neĝo kaj pluvo. Mi ja sciis ke aŭto finfine venos. Al vi ja venadas espero, en kiu estos ankaŭ via porcio. Sed, ree alkuras ŝarĝaŭto. Mi haltigu ĝin por ŝi.

“Dankon!” ŝi diras, “sciuj, ke jam de longe ne plu estas nokta buso. Mi konas la ŝoforon de tiu ŝarĝaŭto. Ĝuste ĝin mi atendas. Nu, ni kune enaŭtiĝu!”

Mi ekridas.

Ho, bela nokto!

*“Nu, ni kune enaŭtiĝu!”*





# "AMIKOJ DE ESPERANTO" FONDITA EN ĈINIO

Fotoj de YAN JIN kaj LAO BAI



Kunveno por la fondo de "Amikoj de Esperanto"



Ye Junjian (dekstre), prezidanto de la kunveno, kaj Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de "Amikoj de Esperanto"



Chu Tunan, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, estas elektita kiel estro de "Amikoj de Esperanto".



Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, estas unu el la iniciatintoj de "Amikoj de Esperanto".



Liu Daosheng, sekretario de la Beijing-a Komitato de KPC kaj estro de ĝia Propaganda Departemento, salutas la kunvenon.

Fama historiisto kaj veterana esperantisto Hu Sheng








Bai Shouyi, profesoro de la Beijing-a Normala Universitato, estas unu el la iniciatintoj de "Amikoj de Esperanto".



Famaj pentristoj Liu Haisu (dekstre), Zhang Leping (maldekstre) kaj fama ĵurnaliŝto Lu Yi (meze)

Veteranaj esperantistoj (de maldekstre): Tang Xun'an, vicestro de la Informejo de la Unua Ministerio de Maŝinkonstruado, verkisto Lou Shiyi, Zheng Senyu, ĉefredaktoro de "Monda Scio", kaj Wang Jihua, vicestro de la eldonejo "Enciklopedio"



Fama sciencisto Zhou Peiyuan (meze), estro de la Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio

Veterana esperantisto Wang Zhongfang, vicestro de la Komisiono por Kultura Kontakto kun Fremdaj Landoj

Fama tradukisto Ge Baoquan parolas en la nomo de la Pekina Esperanto-Asocio.





Veterana esperantisto Huang Nai (meze), vic-prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Blinduloj kaj Surdmutuloj, kaj fama pentristo Dong Shou-ping (maldekstre)



Luo Jun (maldekstre), konsilisto de la Fremd-lingva Eldona kaj Dis-tribua Buroo, surbrusti-gas verdstelan insignon al Liu Zunqi, ĉefredak-toro de "China Daily".



Junaj esperantistoj en la kunveno



La aŭtoro Aixinjueluo Pujie



## De imperiestra familiano al ordinara civitano

La 74-jara aŭtoro estas pli juna frato de Puyi, la lasta imperiestro de Qing-dinastio, pupa imperiestro de la falsa "Manĉurio". Kune kun sia japana edzino Saga Hiroshi nun li loĝas en ĉinstila korto de Beijing (Pekino). — LA RED.

Ankaŭ mi povas labori kiel ordinara funkciulo, tial mi ĉiam ĝojplene kaj kun dankemo laboras en la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Sed ofte vizitantoj dubas pri tio kaj demandas: "Kiel vi pensas, vivante kiel ordinara homo post perdo de la aristokrata vivo luksa kaj komforta?" Tiaokaze mi ĉiam respondas jene: "Mi ĝojas vivi kiel akvero en la vasta maro. Nun mia koro ĝoje batas kune kun tiu de la miliardo da niaj popolanoj. Antaŭe mi vivis aristokratan vivon, sed kondukis kontraŭ la volo de la popolo, pri kio mi sentas hontegon." Komence ili ne komprenis min, sed post kiam ili ekkonis mian vivhistorion, ili ne plu miras pri mia penso.

En 1911, kiam mi estis kvarjara, la Revolucio renversis la feŭdan Qing-dinastion regintan Ĉinion dum 267 jaroj. Tiu lasta imperiestro ja estis mia pli aĝa frato — Aixinjueluo Puyi. Tamen dum 16 jaroj post tio mi daŭre vivis en la reĝa domo kun ĝardeno, kelkcent ĉambroj kaj ĉirkaŭ 80 servistoj. Hejme mi kalkulis jarojn laŭ la erao de la

imperiestro Xuantong, mia pli aĝa frato, kaj en ĉiuj festotagoj ni surhavis robojn de Qing-dinastio kaj paradis surstrate, sekvataj de gardistoj kaj paĝioj. Niaj gastoj plejparte estis parencoj de la imperiestra familio aŭ altranguloj.

Tiam, ĉiumatene vekiginte, mi estis vestita de servistinoj, kiuj eĉ lavis miajn piedojn kaj tondis miajn ungojn. Se mi mem iafoje prenis tondilon, servistinoj tuj ekkriis, timante, ke mi vundus min. Ordinare mi ĉiam estis sekvata de servistinoj. Mi ne povis libere iri, nek eldomiĝi. Mi ne devis manĝi fiŝojn, por ke fiŝostoj ne piku mian gorgon. Unuvorte mi estis neniel libera.

Ekde la infanaĝo oni instruis min ĉiam memori mian devenon de la imperiestra familio de Qing-dinastio, lojale defendi mian fraton "imperiestron" Puyi kaj fariĝi eminentulo de la ŝtato. Mi ĉiam revis pri restarigo de Qing-dinastio. En 1934 la japanoj kondukis Puyi en la Nordorienton por fari lin pupa imperiestro de "Manĉurio". Mi ja estis pli juna frato de lia im-

periestra moŝto. Tiam mi opiniis, ke venas la ŝanco por restarigi Qing-dinastion kaj volonte fariĝis lia oficisto.

En 1945 kiam Japanio kapitulacis, Puyi kaj mi ambaŭ estis kaptitaj. En la komenco ni estis eskortitaj en Sovetunion kaj en 1950 estis metitaj en la koncentrejon por militaj krimuloj en Fushun, Ĉinio. Komence ni timis ke ni estos ekzekutitaj. Sed ekster nia atendo Puyi kaj mi estis amnestiitaj respektive en 1959 kaj 1960. Mi neniam forgesos la tagon en 1961, kiam Puyi kun granda ekscitiĝo rakontis al mi, ke prezidanto Mao akceptis lin, kune kun li manĝis kaj fotiĝis.

Estas pli neforgesebla la sincera zorgo de ĉefministro Zhou Enlai pri ni, ambaŭ fratoj. En 1961 ĉefministro Zhou akceptis nin kaj aranĝis, ke ni laboru en la Instituto de Kultura kaj Historia Materialoj sub la Politika Interkonsiliĝa Konferenco por kolekti kaj ordigi materialon pri la moderna Ĉinio.

Ĉefministro Zhou turnis ankaŭ atenton al la kuniĝo de nia





*En 1923 la 16-jara Pujie (dekstre en la malantaŭa vico) kun siaj patro Zaiŝeng (meze) kaj gefratoj en sia reĝa domo. (La dek homoj sur la foto vivas nun en Pekino, escepte de lia patro kaj lia unua pli juna fratino.)*



*Pujie kaj liaj edzino, filino, bofilo kaj genepoj*

familio. Saga Hiroshi, mia edzino, estas la plej aĝa filino de japana markizo Sanekatsu. Nia geedziĝo okazis en Japanio en 1937, aranĝita de la japana Guangdong-armeo. Kvankam la geedziĝo havis politikan karakteron, tamen ni fidis unu la

alian kaj havas profundan amon. Post kiam mi estis arestita, mia edzino kun profunda malĝojo forveturis al Japanio kun niaj filinoj en 1947. En 1961, kiam mi estis amnestiita, ŝi ĝojplene veturis al Pekino kun nia filino por vidi min. Perme-

site de la registaro, ŝi restis en Ĉinio. Tamen la filino alkiutimiĝis al la japana vivo ĉe siaj geavoj kaj deziris veturi la Japanio. Tial ree naskiĝis kontraŭdiro interne de nia familio. Informiĝinte pri tio, ĉefministro Zhou diris al ŝi: “Via patrino estas japanino kaj edziniĝis al via patro. Estante ĉinino, ankaŭ vi povas edziniĝi al japano! Mi permesas al vi ofte reiri!” Aŭdinte tion, ŝi eklarmis pro emocio. Ĉe sia forveturo ŝi diris al ĉefministro Zhou: “Mi elkore estimas vin.” Poste ŝi edziniĝis al iu japana entreprenisto kaj nun jam havas kvin infanojn. En 1978 ŝi kune kun siaj edzo kaj infanoj venis al Pekino por vidi nin. En 1975 kaj 1979 mi kaj mia edzino veturis al Japanio por vidi miajn boparencojn kaj tie ni vidis multe da malnovaj geamikoj, konataj kiam mi studis en Japanio.

En 1978 mi estis elektita kiel reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj ofte partoprenas socian aktivadon. Ĝenerale ĉiusemajne mi dufoje iras en la kabineton de la Instituto de Kultura kaj Historia Materialoj kaj alihore mi ordigas materialon hejme aŭ akceptas vizitantojn. En la libera tempo mi ankaŭ ekzercas min en kaligrafio kaj pentras ĉinstile dum mia edzino olepentras aŭ verkas japanajn poeziaĵojn.

Miaj familianoj ĉiuj vivas feliĉan vivon escepte de mia unua pli aĝa frato Puyi, kiu mortis en 1967 pro rena kancero, mia unua pli juna fratino kaj mia tria pli juna frato, kiuj mortis antaŭ longe. En la ferioj kaj festotagoj ili ofte min vizitas kune kun siaj infanoj.



BA HONG:

# Antikvaj mitoj kaj legendoj

**A**NKORAŬ en la pratempo, kiam ne troviĝis skribaj signoj, la historio de Ĉinio komuniĝis de generacio al generacio dank' al multaj interesaj mitoj kaj antikvaj legendoj, kiuj certgrade montris la socion de pratempa Ĉinio.

## HUANGDI — LA PRAPATRO DE LA ĈINA NACIO

Legendo diras, ke antaŭ kvin-aŭ sesmil jaroj sur ĉina teritorio loĝis iuj triboj. Huangdi, la gvidanto de norda tribo, estis saĝa kaj kapabla homo, kiu gvidis la tribanojn ŝanĝi sian nomadan vivmanieron, instruis ilin konstrui domojn, bredi brutojn kaj kulturi plantojn kaj konsilis ilin fiksloĝi ĉe la baseno de la Flava Rivero. Por faciligi la trafikon ambaŭborde de la rivero, li inventis ŝipon. Kaj krome, li komisiis al sia historiisto Cangxie krei skribajn signojn por noti okazajn, anstataŭ la mallerta rimedo de ŝnurnodado. Li ordonis sekvanton Danao krei kronologion. Cetere, li ordonis al muzikisto Linglun ĉizi tonikilon el bambuo, kiu servis por reĝustigi la sonon de diversaj muzikiloj kaj harmoniigi ilian ludadon.

Legendo diras, ke lia edzino Leizu inventis silkraŭpan bredadon, kokonan elbobenadon, silkan teksadon kaj kolorigon de silkaĵo por fari vestojn.

Legendo diras ankaŭ, ke Chiyou, la ĉefo de orienta tribo, estis homo terura. Li havis 81 fratojn. Ili ĉiuj havis bestokorpon kaj kupran homkapon kun fera frunto kaj kornoj, povis manĝi sablon kaj ŝtonerojn kaj luktis kuraĝe kaj lerte. La tribo eble prenis iun beston kiel sian totemon. Chiyou ofte gvidis siajn trupojn ataki la tribojn en la nordo.

Por rezisti kontraŭ Chiyou, Huangdi gvidis siajn tribanojn elfari grandan nombron da ŝtonaj tranĉiloj kaj hakiloj kaj faris grandan batalon kontraŭ la tribo de Chiyou ĉe la nuna Zhuolu-gubernio, Hebei-provinco. La batalo iris tre intense.

Ambaŭ flankoj invitis diablojn kaj diojn por helpi. Ĉe la unua atako Chiyou malvenkis kaj faris nebulegon, por ke la tribanoj de Huangdi perdu orientiĝon. Ĉi tiu ordonis generalon Fenghou farigi kompasan veturilon. Dank' al ĝi li faris atakon kontraŭ la stabo de Chiyou, kaptis lin viva kaj mortigis lin. Tiel Huangdi aneksis la tutan tribon de Chiyou al la sia. Post sia venko Huangdi estis elektita kiel la Filo de la Ĉielo. Poste la tribo de Huangdi kunfandiĝis kun aliaj triboj, iom post iom formiĝis la ĉina nacio. Tial la ĉina popolo rigardas Huangdi kiel sian prapatron. Lia tombo nun ankoraŭ troviĝis en Huang-

*Laŭ legendo, antaŭ 5,000-6,000 jaroj en Ĉinio estis saĝa kaj eminenta tribestro Huangdi. Li kune kun siaj tribanoj venkis la ferocan kaj bataleman Chiyou.*





ling-gubernio, Shaanxi-provinco. En la tombejo staras palacoj kaj toboŝtonoj, kaj kreskas dekmiloj da antikvaj cipresoj kaj pinoj. Ĝi estas fama historia vizitindejo.

## LA ABDIKO DE YAO KAJ SHUN

Pasis jam multe da jaroj post Huangdi, kiam aperis gvidanto de la tria unuiĝo Yao, kiu estis eminenta en regado. Li ellaboris kalendaron kaj difinis, ke la tuta jaro estu dividita en kvar sezonojn de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro, tiel ke la terkulturo, brutobredado, fiŝkaptado kaj ĉasado estu farataj laŭsezono. Li vivis tre simple. Kiel ĉiuj aliaj li loĝis en kabano, manĝis krudan rizajon kaj supren el sovaĝa herbo. En somero li portis nur maldelikatan tolveston kaj en vintro plian pecon da cerva ledo. La tribanoj amis lin kiel siajn gepatrojn.

Ekde sia aĝo de dek ses jaroj li komencis gvidi sian popolon kaj tenis la potencon dum 70 jaroj. Kiam li estis 86-jara, li sentis sin maljuna kaj malforta kaj volis trovi eminentulon por anstataŭi lin. Sed lia filo ne taŭgis, ĉar li estis sovaĝa kaj malmodesta. Tiam li informis ĉiujn tribojn alvokante, ke oni rekomendu kompetentan homon. Poste la interkonsiliĝa kunveno de la tria unuiĝo unuanime elektis Shun, opiniante lin homo kun moralo kaj talento. Yao tre ĝojis kaj edzinigis siajn du filinojn al li. Post trijara provado Yao permesis al Shun transpreni la potencon.

Post sia enpotenciĝo Shun mem kulturis teron, fiŝkaptis kaj faris argilajojn. Tial la popolo amis lin. Li dispoziciis specialajn personojn por administri teron,

*Yu gvidis la popolon en peniga laboro de 30 jaroj. Ili fosis multajn kanalojn kaj fine kondukis inundakvon en la maron.*



Ilustritaj de REN MENGXIONG

edukon kaj kulturon, civilajn aferojn, montojn kaj marĉojn kaj diservojn. En sia maljuna aĝo, kiel Yao, ankaŭ li okazigis kunvenon por elekti daŭriganton. Pere de demokratia diskutado Yu estis unuanime elektita kiel daŭriganto de la aferoj de Shun.

Yao kaj Shun estis honoritaj de la ĉina popolo kiel modeloj de prudentaj reĝoj. La legendo pri la abdikado de Yao kaj Shun spegulas la demokratian sistemon de la Primitiva Komunumo.

### YU JUGIS AKVEGON

Laŭ legendo, en la tempo, kiam Yao vivis, sur ĉina teritorio okazis inundo. La inundo dronigis domojn, kampojn kaj ankaŭ multe da homoj. Komence, Yao sendis Gun jugs la akvegion. Li klopodis por tio naŭ jarojn per konstruo de digo. Tiu ĉi rimedo tamen efikis tre malmulte, kaj ĝi ofte alportis al la popolo

novan perdon. Yao komisiis Shun kontroli la tiean laboron kaj ĉi tiu rimarkis la eraron de Gun kaj lin mortigis. Samtempe li ordonis al Yu, filo de Gun, daŭre jugs la akvegion.

Resuminte la sperton de sia patro, Yu opiniis, ke por forigi la akvodanĝeron, krom konstrui digojn, estas pli grave dragi ŝtopitajn riverojn kaj fosi kanalojn, por ke la akvo forfluu. Tial Yu, kun nombro da homoj sub sia gvido, transpasis montojn kaj akvojn, mezuris terenon kaj metis markojn, kaj poste ellaboris planon por jugs la akvon. Tuj sekve, li kaj liaj helpantoj, tenante ŝtonajn hakilojn, tranĉilojn kaj ŝovelilojn, komencis la jugon.

Por elimini katastrofon de inundo, Yu klopodis dum dek tri jaroj. Li manĝis krudajn manĝaĵojn kaj vestis sin simple, kaj liaj piedoj kaj manoj estis plenaj de kaloj. Dum la dek tri jaroj li

trifoj preterpasis sian hejmon sen eniro al ĝi. Unuafoje, kiam li preterpasis sian hejmon, li aŭdis, ke lia novnaskita fileto ploras, kaj liaj helpantoj admonis lin eniri la domon, sed li timis prokrasti la laboron kaj rifuzis. Duafoje, kiam li preterpasis sian hejmon, lia fileto jam povis lin voki kaj forte svingis sian maneton por lin saluti. Anstataŭ eniri la domon, kun korsento li mansalutis sian edzinon kaj fileton. Kaj triafoje, kiam li preterpasis sian hejmon, la pli-ol-dekjara filo alkuris por lin voki, li karese palpis lian kapon kaj ordonis, ke li diru al la patrino, ke li ne povas reveni al la hejmo pro okupateco en jugo de akvo. Tion dirinte, Yu haste foriris.

Dank' al dek-tri-jara klopodado Yu gvidis la popolon en draĝo de ŝtopitaj riveroj kaj fosis plurajn kanalojn, kaj fine kondukis la inundon en riveregojn, tra kiuj la inundo fluis en maron, tiel ke la inunda katastrofo estis forigita kaj la popolo komencis stabilan kaj pacan vivon.

Yu ne nur peneme submetis la inundon, sed ankaŭ direktis la popolon disvolvi la produktadon, utiligante akvon kaj teron. Li ordonis, ke Yi disdonu rizsemojn al loĝantoj en malalta loko kaj instru kulturi rizon. Li ordonis ankaŭ al Houyi, ĉefo pri terkulturo, ke li disdonu semojn de iuj plantoj al loĝantoj en la inunditaj regionoj kaj instru ilin kulturi vegetaĵojn, rikolti grenon kaj fruktojn por eviti malsaton kaj katastrofojn.

Pro siaj grandaj meritoj Yu estis amata de la popolo kaj fariĝis bona daŭriganto de la aferoj de Shun.



## Ruĝbeka birdo

En Liuyang-gubernio de Hunan-provinco, Ĉinio, troviĝas bela rara birdeto (*Leiothrix lutea lutea*) kun ruĝaj beko kaj piedoj, malpeza korpo kaj plumaro helflava, skarлата, blanka, malhel-blua kaj grize-argenta. La indiĝenoj nomas ĝin "bunta unukornulo". Same kiel la mandarenaj anasoj (*Aix galericulata*), la femala kaj maskla ruĝbekaj birdoj neniam forlasas unu la alian. Se unu estus izolita, la alia fastus kaj mortus de malĝojo aŭ sin frapmortigus. Se aglo aŭ aliaj rabobirdoj atakas lin, ĉi tiuj kune batalas, ĝis la malamikoj estas forpelitaj.

## Ĉinaj ibisoj

En majo 1981 ĉinaj sciencistoj trovis rarajn ibisojn en loko 1,200-1,400 metrojn super la marnivelo sur la suda deklivo de Qinling-montaro en Yangxian-gubernio, Shaanxi-provinco. Tiuj birdoj estis netrovitaj dum la pasintaj 20 jaroj kaj oni opiniis ke ili eble malaperis. En tiu loko malkovriĝis du nestoj de ibisoj, kiuj distancas du kilometrojn unu de la alia kaj estas interbaritaj de monto. Provizore oni nomas tiun grupon da sovaĝaj ibisoj "ibisaro de Qinling n-ro 1". La koncerna institucio faras esploradon kaj preparlaboron por starigi rezervejon de ibisoj.

Ibiso estas tre bela. Ĝia korpo estas blanka, ĝiajflugiloj kaj vosto

rozkoloraj, kaj ĝiaj beko kaj kapo vermiljonaj. Tiaj birdoj iam estis vaste troveblaj en Ĉinio, Koreio, Japanio kaj la malsupra baseno de Heilong-rivero en Sovetunio. De la 19-a jarcento ilia nombro reduktiĝis iom post iom. Nur en zoologia ĝardeno de Japanio vivas ses ibisoj. Ili estas unu el la plej malmultnombraj birdospecioj jam konataj en la mondo. Ĉinio do difinis tiujn birdojn kiel animalojn plej protektendajn. Sed de 1964 neniu akiris ĝian specimenon aŭ rimarkis ĝiajn spurojn. La ĉi-foja eltrovo tre ĝojigis la ĉinajn ornitologojn.

## Kurioza rampulo

Ĝuang-a kamparano de Jingxi-gubernio, Guangxi, Ĉinio, kaptis kuriozan kvarpiedan rampulon kovritan de malgrandaj skvamoj nigraj kaj flavaj, kun longeco de unu kaj duona metroj kaj pezo de tri kilogramoj. Klare montriĝas ĝia buŝo, nazo, okuloj kaj oreloj. Ĝia kapo similas al tiu de pitono. Ĝia nigra lango estas elasta, en formo de kvardenta forko. Ĝiaj supra kaj malsupra makzeloj surhavas maldikajn segildentojn. Ĝiaj kruroj, similaj al tiuj de rano, estas dikmuskolaj kun longeco de 20 centimetroj. Ĝiaj plandoj similas al tiuj de simio kaj ĝiaj akregaj ungoj al tiuj de aglo. Ĝi ne estas palmopieda kaj ĝia plata vosto similas al triangula fajlilo. Ĝi rampas per siaj kvar membroj. Ĝi kun longa viglega vosto estas rapidmova kaj ĝia vosta parto moviĝas kiel serpento.

Tiu monstro estas milda kaj hom-evitema. Laŭ ĝia fekajo kun plumeroj kaj ostepecetoj oni konjektas, ke ĝi estas karnomanganto. Laŭ la unua ekspertizo de koncernaj esploroj, ĝi apartenas al la subklaso de skvamuloj de la klaso de vertebrohavaj rampuloj. Sed oni ankoraŭ ne certigis pri tio, al kiu familio ĝi apartenas.



# Plibonigo de la ekonomiaj rilatoj inter la sudo kaj la nordo estas la fluo de la epoko



*En la kunveno*

**E**N la lasta tagdeko de oktobro 1981 kunvenis en la meksika urbo Cancun la ŝtatestroj de dek kvar evoluantaj landoj kaj ok evoluintaj landoj. En tiu kunveno oni diskutis pri internacia kunlaboro por disvolvi ekonomion, savis la interparoladon inter la sudo kaj la nordo el la seneliro kaj pretigis kondiĉojn por plibonigi la ekonomiajn rilatojn inter tiuj mondpartoj.

## KIEL FARIĜIS LA INTERPAROLOJ INTER LA SUDO KAJ LA NORDO

La interparoloj pri ekonomiaj problemoj faritaj inter la evoluantaj landoj en la sudo kaj la evoluintaj landoj en la nordo estas ĝenerale nomataj interparoloj inter la sudo kaj la nordo.


De longe ekzistas profundaj kontraŭdiroj ekonomiaj inter la evoluantaj kaj evoluintaj landoj. Pro longa koloniisma regado en la pasinteco, la evoluantaj landoj plejparte suferas de postrestinteco en industrio, manko de kapitalo kaj mizereco en teknikaj fortoj. Multaj el ili ne povas produkti sufiĉe da greno por

kontentigi sian propran bezonon, kaj nemalmultaj el ili devas subteni sian nacian ekonomion per produktado de malmultaj specoj de agrikulturaj aŭ mineralaj produktaĵoj. Iliaj naturaj riĉfontoj, prilaborado de krudaj materialoj kaj disvendado de eksterlandaj produktaĵoj estas regataj de fremdlandaj kapitaloj kaj ankaŭ la internacia komerco kaj financo estas en monopolo kaj sub direktado de la okcidentaj industriaj landoj kaj iliaj grandaj kompanioj. Preskaŭ ĉiuj subevoluintaj landoj suferas de fatala postrestinteco en ekonomio kaj de pezaj ŝuldoj.

La interparoloj inter la sudo kaj la nordo embriiĝis en la sesdekaj jaroj. Por disvolvi sian nacian ekonomion, landoj de la tria mondo, kiuj en tiu tempo akiris politikan sendependecon, senĉese postulis ŝanĝi sian pozicion de neegalrajteco en la internaciaj ekonomiaj rilatoj. Ili postulis, ke la industrie disvolviĝintaj landoj donu al ili pli multe da helpo kaj pruntu al ili pli multe da mono, plibonigu la komercajn kondiĉojn de la evoluantaj landoj, stabiligu la pre-

zojn de iliaj eksportaj krudmaterialoj kaj radikale reformu la malnovan internacian ekonomian ordon. Tamen tiuj raciaj postuloj ne estis serioze konsiderataj de la evoluintaj landoj. Malgraŭ tio, landoj de la tria mondo faris persistemajn klopodojn. Ili faris aktivajn strebojn en la bloko de 77 landoj, la konferencoj de nealiancigitaj landoj kaj la organizaĵo de petrol-eksportaj landoj kaj ebligis la okazigon de la UNO-Konferenco pri Komerco kaj Disvolvado, kiu estis uverturo de la interparoloj inter la sudo kaj la nordo.

En la sepdekaj jaroj pli kaj pli potenciĝis la influo de la landoj de la tria mondo sur la internacia politika scenejo kaj sekve la evoluintaj landoj prenis iliajn supre diritajn postulojn en sian konsideron. En 1974 la Speciala Konferenco de la Ĝenerala Asembleo de UNO aprobis la Deklaracion pri Starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj la agadprogramon por tio. Sekve Francio kaj aliaj okcidentaj landoj proponis anstataŭigi la kontraŭstaradon inter la du partoj de la terĝlobo per interparoloj. En la jaroj 1975 kaj



*Zhao Ziyang, ĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko, en la inaŭguro de la Internacia Konferenco pri Kunlaboro kaj Disvolvo*



1977 okazis en Parizo du kunvenoj pri internacia ekonomia kunlaboro ĉeestitaj de reprezentantoj de 27 landoj. Sed pro diferencoj inter la opinioj la afero ne multe antaŭeniĝis. En 1980 oni denove kunvokis specialan konferencon de la Dekunua Ĝenerala Asembleo de UNO kaj preparis por okazigi tuttergloban ekonomian traktadon inter la sudo kaj la nordo, sed tio ne efektiviĝis pro malsukceso interkonsenti pri la tagordo kaj programo.

### **LA EKONOMIAJ RILATOJ INTER LA SUDO KAJ LA NORDO**

La interparolado inter la sudo kaj la nordo estis kutime rigardata kiel necesajo por nur unu flanko, sed efektive ĝi koncernas la radikalajn longperiodajn interesojn de ambaŭ flankoj; ĉar la hodiaŭa internacia ekonomio ĉefe karakteriziĝas per kreskado de la interdependeco de ĉiuj landoj.

Estas evidente, ke la evoluantaj landoj ĉiuj bezonas helpon kaj kunlaboron de la industrie disvolviĝintaj landoj pri kapi-

talo, teknologio kaj enspezo el internacia komerco. Oni ofte neglektas la dependecon de la industrie disvolviĝintaj landoj al la evoluantaj landoj. Sed efektive la unuaj multflanke devas dependi de la lastaj, plej okulfrape en bezono de petrolo.

La industrie disvolviĝintaj landoj konsumas tre grandan kvanton da energio kaj ilia konsumokvanto de petrolo konsistigas du trionojn de tiu de la tuta mondo, dum 75 procentoj de ilia bezonata petrolo devas esti importataj el la tria mondo. 40 procentoj de la petrolo bezonata de Usono kaj 90 procentoj de la petrolo bezonata de Japanio, FR Germanio kaj Francio devas esti importataj. Kvankam nun multaj landoj esploras la eblecon anstataŭigi petrolon per energio de la suno, vento, akvo, metano, maro kaj nukleo, tamen ankoraŭ longan tempon oni bezonos por atingi la celon de grandkvanta utiligo de tiuj novaj energispecoj.

Krom petrolo, la evoluantaj landoj provizas la evoluantajn landojn ankaŭ per 60 procentoj de la terkulturaj kaj mineralaj

produktaĵoj eksportataj en la tuta mondo. Pli ol 90 procentoj de la ĉefaj mineralaj produktaĵoj bezonataj de okcidenta Eŭropo kaj Japanio estas importataj el evoluantaj landoj kaj pli ol duono de la naŭ ĉefaj industriaj materialoj bezonataj de Usono devas esti importata. Efektive la prospereco kaj disvolviĝo de la ekonomio en la industrie evoluintaj landoj ĉiam dependas de la stabila liverado de krudaj materialoj el landoj de la tria mondo.

Ankaŭ en eksporto de kapitalo la okcidentaj industriaj landoj dependas de la tria mondo. Pli kaj pli akre ili sentas la bezonon investi sian superfluan kapitalon en la merkaton de la tria mondo. En la kvindekaj jaroj la meznombra sumo de tia eksporta kapitalo en ĉiu jaro estis kvin miliardoj da usonaj dolaroj; en la komenco de la sepdekaj jaroj tiu sumo kreskis al dudek miliardoj da usonaj dolaroj, sed nun oni taksas, ke ĝi jam atingis okdek miliardojn da usonaj dolaroj. Ilia kapitalo investita en evoluantaj landoj povas alporti al ili duoblan ren-



ton kompare kun tiu investita en evoluintaj landoj. En 1973 la rekta renta procento ricevita de Usono por evoluintaj landoj estis 13.8%, dum tiu por evoluantaj landoj estis 25.1%.

Pli kaj pli grandigas la dependeco de la industriaj landoj al la tria mondo ankaŭ en eksportado. La eksporta kvanto de Usono al la evoluantaj landoj en la periodo de 1969 ĝis 1971 konsistigis 29.6% de ĝia totala eksporta kvanto, kaj en 1979 ĝi kreskis al 33.8%. En la sama periodo tiu de la Eŭropa Ekonomia Komunumo kreskis de 14.2% al 21%, kaj tiu de Japanio kreskis de 40.9% al 45%. La kreskado de eksportoj el la evoluintaj landoj ludas gravan rolon en subtenado al la ekonomio de tiuj landoj. Kaj krome estas notinde, ke rapidege kreskas la loĝantaro de la tria mondo, vasta estas ĝia merkato kaj granda estas ĝia latentia ekonomia forto. Estas antaŭvideble, ke ĝi okupos ankoraŭ pli gravan lokon en la eksporta merkato de la industrie disvolviĝintaj landoj en la venontaj dudek jaroj.

Laŭ longperioda konsidero, la ekonomia disvolviĝo de la landoj de la tria mondo kaj la kreskado de la ekonomio de la industrie disvolviĝintaj landoj dependos unu de la alia kaj devas kune progresi. Tial multaj klarvidaj eminentuloj de okcidentaj landoj postulis en la lastaj jaroj bone solvi la ekonomian rilaton inter la sudo kaj la nordo.

### **GRAVA KUNVENO POR INTERPAROLO INTER LA SUDO KAJ LA NORDO**

En la ŝtatestra kunveno ĉe Cancun por interparolo inter la sudo kaj la nordo oni vastamplekse intersanĝis opiniojn pri la

interrilatoj. La kunvenantoj akiris pli bonan konon pri problemoj, kiujn vizaĝas la evoluantaj kaj evoluintaj landoj, kaj esprimis sian deziron pri plibonigo de la rilatoj. Ĉiuj unuanime konsentis okazigi tuttergloban interparoladon pri la rilatoj inter la du mondpartoj. Ĉio tio sendube akcelos la plibonigon de la rilatoj inter ili en la estonteco.

Nemalmultaj personoj el evoluantaj landoj diris, ke la okazigo mem de la kunveno en Cancun ja havas gravan signifon. Multaj evoluantaj landoj urĝe postulas reformi la maljustan kaj neracian malnovan ekonomian ordon internacian por disvolvi sendependan nacian ekonomion, sed tiu justa postulo ne ricevis dumlonge grandan atenton, kaj sekve plue disvolviĝis la ekonomiaj kontraŭdiroj inter la sudo kaj la nordo. Ĉifoje ŝtatestroj de ok evoluintaj landoj kaj 14 evoluantaj landoj kunsidis kaj diskutis pri plibonigo de la ekonomia interrilito. Tio montras al ni, ke reformo de la malnova internacia ekonomia ordo kaj reguligo de la rilatoj inter la sudo kaj la nordo laŭ la principo de egaleco kaj reciproka utilo jam fariĝis fluo de nia epoko.

La disvolviĝo de la tutmonda ekonomio ĉiam pli intimigis la rilatojn inter la landaj ekonomioj kaj pligrandigis iliajn reciprokajn influojn. Plibonigo de la rilatoj inter la sudo kaj la nordo estas komuna celo por la kunvenantoj. Antaŭ nelonge la franca prezidanto Mitterrand diris, ke se la ekonomio de la malriĉaj landoj stagnados, evidente ankaŭ la riĉaj landoj suferos de tio, tial helpi la trian mondon signifas helpi ilin mem liberiĝi

el la krizo. Ankaŭ aliaj ŝtatestroj esprimis tian vidpunkton en siaj paroladoj en tiu kunveno.

La ĉina ĉefministro Zhao Ziyang diris en sia parolado: "La du ĉefaj problemoj en la nuna mondo estas defendo de la mondopaco kaj akcelo de la disvolviĝo, problemoj, kiuj estas strikte interligitaj kaj nedisigeblaj." Nemalmultaj el la ŝtatestroj same tiel opiniis. Ili diris, ke ekonomia malprospero de evoluantaj landoj kaj streĉiĝo de la rilatoj inter la sudo kaj la nordo ofte kaŭzas tumulton en iuj landoj kaj estigas ŝancojn por agreso fare de hegemoniistoj. Tial plibonigo de la ekonomiaj rilatoj inter la sudo kaj la nordo estas ne nur ekonomia problemo, sed ankaŭ koncernas la gravan politikan problemon de defendo de mondopaco kaj tenado de monda stabileco.

Estas evidente, ke plibonigo de la rilatoj inter la sudo kaj la nordo estas afero grava kaj urĝa tiel por la evoluintaj kiel por la evoluantaj landoj. Ĝuste pro tio kunlaboremo kaj komprenemo fariĝis la reganta spirito en la kunveno ĉe Cancun.

Plibonigo de la rilatoj inter la sudo kaj la nordo kaj reformo de la malnova internacia ekonomia ordo estas malfacila batalo. Barojn certe oni renkontos. Tamen, se la multnombraj evoluantaj landoj kaj la prudentaj evoluintaj landoj nur pligrandigos sian interkomprenon kaj persiste strebados, ili certe akiros pli kaj pli grandajn sukcesojn.





XIAO ZHIJIE:

## Picasso—fama pentristo de nia jarcento



**L**A 25-a de oktobro 1981 estis la 100-a datreveno de la naskiĝo de Pablo Ruiz Picasso, fama hispana pentristo kaj ĉefa reprezentanto de la franca moderna skolo. Dum sia 70-jara artista vivo li kreis ĉirkaŭ 20,000 olepentraĵojn, lignogravuraĵojn, skulptaĵojn, skizojn kaj aliajn verkojn. Verŝajne, ekzistas neniu moderna belartista, kiu kiel li povas doni tiel fortan kaj imagriĉan respondon al diversaj eventoj kaj la ŝanĝiĝema situacio en ĉi tiu jarcento. Liaj verkoj havas grandan influon sur la modernaj okcidentaj artaj skoloj.

Picasso naskiĝis en Malaga en suda Hispanio. Lia patro Jose Ruiz Blasco estis artisto kaj profesoro de la Akademio de Belarto en Barcelono. Jam en sia infanaĝo Picasso penis imiti sian patron en arto. Liaj skizoj montris rudimentan lertecon kaj akran observokapablon. Kiam li estis dekjara, lia tuta familio transloĝiĝis al La Coruna apud Atlantiko, kie ili loĝis kvar jarojn. Kaj tiam komenciĝis lia pentrista vivo.

En la printempo de 1895 lia tuta familio ekskursis al Malaga. Dum restado survoje en Madrido li unuafoje vidis grandan kvanton da pentraĵoj de famaj majstroj konservatan en la Muzeo Prado. Li ekvizitis belartan lernejon, kvankam li estis ankoraŭ juna por tio. Dume li faris olepentraĵojn tute en la maniero de akademia skolo kaj per tio montris sian mirigan talenton.

En 1897 liaj gepatroj lernigis lin en la Reĝa Akademio de San Fernando en Madrido, sed li okupis sin ĉefe per trabutikado aŭ vizitado al muzeoj. Februare de 1900, kiam li apenaŭ atingis la aĝon de 19 jaroj, li unuafoje okazigis ekspozicion de siaj pentraĵoj.

Post oktobro 1900 Picasso dufoje venis al Parizo por mallonga restado. Dum tiu tempo rimarkinde ŝanĝiĝis lia pentra stilo. Liajn pentraĵojn ĉefe karakterizis blua koloro, kaj kompatindaj mizeruloj aperis sub lia peniko. Tial liaj pentraĵoj en tiu periodo estas nomataj verkoj de blua (aŭ malgaja) periodo.

Kial okazis tiu ŝanĝo? Iuj diris, ke la kaŭzo kuŝis en lia malriĉa vivo en Parizo kaj la tragika sinmortigo de lia bona amiko Carles Casagemas. Sed aliaj opiniis, ke estis tre riĉa la fonto nutranta lian bluan periodon. En tiu tempo la granda diferenco inter la klasoj de la hispana socio kaj la malriĉeco de la popolo influis la socian vivon de Barcelono, kiu iom post iom fariĝis centro de revolucia kaj anarkiisma penso. La lokoj por artistaj renkontiĝoj estis plenaj de ribelema spirito. Estis Parizo, kie Picasso vidis tre multajn novajn fruktojn de arto, kie ankaŭ evidentiĝis malbonaj tendencoj de la moderna socio. Kaj ĝuste en tia medio la juna Picasso ekhavis sian fundamentan vidpunkton pri vivo. Li vizitis malsanulejojn, gastejojn kaj filantropiajn instituciojn. En siaj olepentraĵoj li figuris nur almozuojn, malsanulojn, kriplulojn aŭ vagabondojn en silento kaj soleco por esprimi sian ĉagrenon kaj simpatian.

Aprile de 1904 Picasso forlasis Barcelonon por ĉiam kaj elmiĝis al Parizo por tie fiksloĝi. Sekve de tio finiĝis la blua periodo kaj komenciĝis la roza aŭ cirka. La epiteto "cirka" pli figure spegulas la enhavon de liaj verkoj. Dum tiu periodo la delikate ruĝeta koloro superregis la aliajn kolorojn en liaj olepentraĵoj.

Picasso transiris de la unua al la dua periodo pro diversaj faktoroj, kiel ekzemple, lia vigla multflanka talento, kaj cetere, la influo de liaj vivkondiĉoj kaj medio sur li. Li vivis kviete kaj komforte en Parizo, li estis inspirita de nova etiko, li havis esperon pri la estonteco, kun plena fido pri la bonkoreco kaj



*Knabino antaŭ Spegulo*

racio de la homaro. Li kaj liaj amikoj ofte vizitis cirkon. Li havis grandan simpation al cirkartistoj. Ŝajnis al li, ke ili, kunligitaj per profunda amo, dividas inter si ĉiun feliĉon kaj ĉiun malfeliĉon kaj neniam konas egoismon kaj trompon. Kaj liaj verkoj en tiu periodo karakteriziĝis per milda koloro, klara priskribo kaj harmonia stilo.

Sed apenaŭ li atingis novajn sukcesojn, li forlasis tiun vojon. Li pasigis la someron de 1906 en iu hispana vilaĝeto kaj revenis al Parizo aŭtune. Kaj tiam radikala ŝanĝo okazis al liaj verkoj. En 1907 aperis lia olepentraĵo "La Knabinoj de Avignon". Ĝi estas la komenco de kubismo kreita de li kaj Georges Braque. Iuj kritikistoj rigardis tiun olepentraĵon kiel "limŝtonon por la moderna arto", opiniante ke li dis-

volvis novan metodon observi la mondon.

De 1915 ĝis la komenco de 1920 Picasso sin turnis al la realisma pentrado. Li kreis multajn pentraĵojn en klasika stilo kaj forte sentebla skulptarto. Ekde 1930 li klare inklinitis al superrealismo. Kaj Picasso kaj la superrealismo rekonis la principon, ke arto povas esprimi ion neesprimeblan por la realo. Traktante sian rilaton kun la superrealismo, Picasso diris: "Mi ĉiam klopodas observi la naturon kaj streĉi mian atenton al simileco pli vera ol la realo, ĝi superis la realismon." Tamen ekzistas granda malsameco de opinioj inter Picasso kaj la superrealismo. Laŭ la lasta, la antaŭa tro dependas de la objektiva mondo kaj konkretaj objektoj kaj estas tre malproksime de la superrealista fantazia mondo.

En aprilo 1937, kiam kulminis la hispana enlanda milito, germanaj faŝistaj aviadiloj kunage kun trupoj de Franco bombadis la pacan urbon Guernica en norda Hispanio kaj tiel forrabis la vivon de miloj da senkulpaĵoj. Por protesti kontraŭ tiu krimago, Picasso faris la grandegan murpentraĵon "Guernica" en stilo kubisma, realisma kaj superrealisma, kiu vidigas doloron, suferon kaj barbarecon. Ĝi estis konservata pli ol 40 jarojn en la Muzeo de Moderna Arto en Novjorko kaj fine donita al Hispanio nur en septembro 1981. Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Picasso tiu fama pentraĵo longe sopirata de la hispana popolo estis unuafoje ekspoziciata en la Muzeo Prado, Madrido.

La 5-an de oktobro 1944, post kiam Parizo liberiĝis de la germana okupado, la franca ĵurnalo "La Humaneco" anoncis, ke Picasso fariĝis membro de la Komunisma Partio de Francio. Poste, en 1951 kaj 1952, li kreis tri gravajn verkojn, nome "La Masakro en Koreio", "Milito" kaj "Paco". En 1949 li donacis sian litografajon "Kolombo" al la Pariza Mondpaca Konferenco laŭ ĝia peto kiel simbolon de la pacmovado.

En siaj lastaj jaroj Picasso faris multajn skulptaĵojn, fajencaĵojn k.a. En 1972, kiam li estis 91-jara, li kreis sian lastan verkon "Memporetro". Li mortis la 8-an de aprilo 1973.

Forpasis preskaŭ naŭ jaroj, de kiam li forlasis ĉi tiun mondon. Li, fekunda pentristo, vivis longan vivon. Dum sia tuta artista vivo li variigis sian pentran stilon kaj pentran manieron, sed liaj meritoj restas ankoraŭ diskutataj.



**RIĈEGA** estas la trezoro de la ĉina  
klasika poezio kaj tre longa ĝia historio

## EL ĈINA POEZIO

Rekomendas al vi 100 poemojn de famaj poetoj antikvaj kaj modernaj. Ili estas kun diversaj nuancoj kaj facile legeblaj. Kaj krome, per bone klariga antaŭparolo la tradukinto enkondukas vin en la ĉinan klasikan poezion almenaŭ tiom, kiom necesas por konatigi kun ĝia verstekniko.

Kompilis kaj esperantigis Prof. S. J. Zee


Eldonis "EL POPOLA ĈINIO"

Numero: 10-Es-1526 Formato: 148 × 210 mm. 156 paĝoj

Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90 bind. £2.90 US\$5.90

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA** aŭ **Peranto de EPC**

aŭ **Esperanta Sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ**  
(GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



## LA KVARA SESIO DE LA KVINA TUTLANDA POPOLA KONGRESO EN PEKINO

La Kvara Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko okazis de la 30-a de novembro ĝis la 13-a de decembro 1981.

La ĉina ĉefministro Zhao Ziyang faris al la sesio la raporton pri la registara laboro sub la titolo "La Nuna Ekonomia Situacio kaj Politiko pri Estonta Ekonomia Konstruado" kaj la financministro Wang Bingqian faris la raporton "Pri la Ŝtataj Finkalkuloj por 1980 kaj la Plenumo de la Ŝtataj Financaj Taksoj por 1981". La ĉefministro diris, ke la plano por la ĉina ekonomio de

1981 povos esti plenumita kaj la celo stabiligi la nacian ekonomion efektivigita, la tuta situacio de la ekonomio estas multe pli bona ol tiu atendita kaj la nacia ekonomio jam surpaŝis la vojon al stabila disvolviĝo. Li diris ankaŭ, ke la stabileco de la ĉina ekonomio montriĝas unue en fundamenta ekvilibro inter financo kaj kredito. Krome, varprezoj estas stabilaj, agrikulturo havas plenampleksan pliprodukton, la produktado de la malpeza industrio kreskas grandskale, tiu de la peza industrio komencis levigi, pligrandigi en- kaj eksterlandaj komercoj kaj daŭre pliboniĝis la popola vivo.

La reprezentantoj diskutis pri la raportoj kaj montris sian aprobon.

Post serioza diskutado kaj ekzameno la sesio fine aprobis en sia lasta kunveno la "Leĝon pri Ekonomiaj Kontraktoj de la Ĉina Popola Respubliko", "Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko pri Enspezimposto por Eksterlandaj Kompanioj", "Civilproceduran Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko" kaj rezolucion pri disvolvo de movado planti arbojn.

## PARO DE MODERNAJ ŜAKTOJ EKFUNKCIOS

Baldaŭ ekfunkcios la du ŝaktoj de Xinglongzhuang-karbo minejo de Yanzhou, Shandong-provinco. La minejo kun jara produktopovo de 3 milionoj da tunoj da karbo situas okcidente de la Tianjin-Pukou-a Fervojo. Oni aplikas en la minejo kompare avangardajn teknikojn en levado, transportado, komunikado, drenado kaj elektroprovizado. La konstruado de la du ŝaktoj, kiuj estis projektitaj kaj instalitaj de Ĉinio mem, daŭris ses kaj duonan jarojn.

## SUKCESO DE ĈINAJ GIMNASTOJ EN LA 21-A MONDA GIMNASTIKA ĈAMPIONECA KONKURSO

La 21-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso okazis en Moskvo de la 22-a ĝis la 29-a de novembro 1981.


La ĉinaj gimnastoj gajnis sume du orajn, kvar arĝentajn kaj du kuprajn medalojn. La ĉina virina teamo gajnis la duan lokon de la tea-

## SPRITAĴO DE LA ANTIKVA ĈINIO

# Kapitalo de ŝuisto



Estas ŝuisto, kiu havas kapitalon de nur paro da ledaj plandumoj.



Kliento surmetas la ŝuojn replandumitajn de li, sed la plandumoj falas post nur kelkaj paŝoj.



La ŝuisto sekvas la klienton kaj reprenas ilin.

ma konkurso kaj la ĉina vira teamo la trian lokon. Li Yuejiu kaj Li Xiaoping gajnis respektive ĉampionecon de grundgimnastiko kaj tiun de ĉevalado. Ma Yanhong gajnis la duan lokon de ŝtupa paralelado kaj Chen Yongyan la duan lokon de trabado. Krome, tri gimnastoj eniris en la viran ĉiurondan konkurson por la unuaj ok lokoj kaj iu gimnastino gajnis la kvaran lokon de la virina ĉiuronda konkurso. En individuaj konkursoj kvin gimnastoj kaj sep gimnastinoj viciĝis inter la gajnintoj de la unuaj ok lokoj.

#### 49 FRIDUJOJ POR VIANDO FIN-KONSTRUITAJ EN XINJIANG

Tiuj fridujoj kun totala volumeno de 25,000 tunoj dislokiĝas en 42 gubernioj norde kaj sude de Tian-shan-montaro en la Ujgura Aŭtonoma Regiono de Xinjiang.

#### ĈINA VIRA KORBOPILKA TEAMO GAJNIS LA AZIAN ĈAMPIONECON

La Ĉina Vira Korbopilka Teamo kvarfoje gajnis ĉampionecon en la 11-a Azia Vira Korbopilka Konkur-

so. Kaj ĝi partoprenos en la Naŭa Monda Vira Korbopilka Konkurso en 1982 en Kolombio, reprezentante Azion.

La teamo de suda Koreio gajnis la duan lokon. La sekvajn lokojn gajnis respektive la teamoj japana, filipina, hinda, malajzia, tajlanda, irana, pakistana, hongkonga, singapura kaj srilankaa.

#### POR PROTEKTI HISTORIAJN OBJEKTOJN

La pekina popola magistrato jam ellaboris novajn regulojn por protekti historiajn objektojn de Pekino, la antikva kultura urbo kun longa historio.

Nun 78 lokoj, inkluzive de la Granda Muro, Imperiestra Palaco kaj Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio, estas listigitaj kiel lokoj atente protektataj de la centra aŭ loka instanco. Tiuj objektoj havas gravan historian signifon kaj grandan valoron en arto kaj scienco.

La reguloj difinas, ke estas malpermesate en la sfero de la protektataj historiaj restaĵoj kaj aldoni novajn konstruaĵojn kaj malkonstrui

aŭ rekonstrui la originalajn konstruaĵojn; kaj ke novaj konstruaĵoj apud la protektataj lokoj nepre devas esti akordaj kun la historiaj konstruaĵoj en formo, alteco, grandeco, koloro ktp.

#### SINTEZA PEPTIDO C DE HOMA PORINSULINO PRODUKTITA EN ĈINIO

Ĉinio unufoje sintezis peptidon C de homa por-insulino kaj starigis radioaktivan imunologia analizteknikon. Per tiu grava sukceso ĝi plenigis sian vakuon en la esplorado de biokemio kaj medicino kaj viciĝis inter la avangardaj landoj sur tiu kampo.

Tiu atingo malfermas novan vojon en esplorado de metabolo de karbohidratoj kaj la funkcio de insulino kaj estas la plej nova metodo en la mondo por diagnozi diabeton. Ĝi estis plenumita de la Ŝanhaja Biokemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Ĝenerala Hospitalo de la Ĉina Mararmeo.

Nuntempe sep malsanulejoj kaj medicinaj esplor-institutoj en Ŝanhajo kaj Pekino uzas tiun metodon kaj akiris kontentigan rezulton.



*Iun tagon, kliento foriras jam malproksimen, sed li ne trovas la plandumojn.*



*La ŝuisto ploras kun ĉagreno: "Perdiĝis mia kapitalo, per kio do mi vivtenu min!"*



*Reveninte li trovas la plandumojn en sia domo, ĉar ili estas falintaj antaŭ la eliro de la kliento.*





### **ĈINA-USONA SIMPOZIO PRI ALGOJ OKAZIGITA EN ĈINIO**

La simpozio okazis en Qingdao la 20-an de novembro lastjare. En ĝi 16 ĉinaj kaj 13 usonaj sciencistoj diskutis serion da fakaj temoj pri algologio.

Estis legitaj 33 disertaĵoj interalie pri la klasifiko, morfologio, strukturo kaj evoluo de algoj; iliaj generado, vivhistorio kaj heredeco; iliaj ekologio, komuna ekologio kaj malsanoj; iliaj fiziologio kaj biokeĥmio, kaj ankaŭ iliaj kulturado kaj utiligado. La kanada alga specialisto d-ro Jack McLachlan, prezidanto de la Internacia Mar-trudherba Asocio, kaj la norvega mar-trudherba kemiisto Aune Jensen, vicprezidanto de la asocio, ĉeestis la simpozion kiel observantoj.

### **FRANCA TRADUKO DE "SONĜO EN RUĜA BUDUARO" ELDONITA EN PARIZO**

Franca traduko de "Sonĝo en Ruĝa Buduaro", ĉina klasika romano, estis eldonita en Parizo en novembro 1981. Ĝi estis tradukita de la ĉina instruisto Li Zhuhua kaj lia edzino, kiuj loĝas en Francio.

Sub aŭspicio de Unesko la traduko estis eldonita de la franca eldonejo Gallimard kaj listigita en la "Sepstela Biblioteko", la granda kolekto de famaj mondaj literaturaj verkoj.

### **EKSPOZICIO DE MODERNAJ ĈINSTILAJ PENTRAĴOJ EN JUGOSLAVIO**

La ekspozicio komenciĝis la 19-an de novembro 1981 en Beogrado, la ĉefurbo de Jugoslavio. Ĝi eksponis 60 ĉinstilajn pentraĵojn, lignogra-vuraĵojn kaj novjarajn pentraĵojn de

la famaj ĉinaj pentristoj Qi Baishi, Xu Beihong, Jiang Zhaohu, He Xiangning, Guan Shanyue, Wang Xuetao, Wu Zuoren kaj Gu Yuan.

### **BILDEKSPOZICIO PRI LA VIVO DE LUSIN OKAZIGITA EN DANLANDO**

En novembro 1981 la Azia Instituto de Nordeŭropo okazigis en la Kopenhaga Universitato bildekspozicion, memore al la centjara jubileo de la naskiĝo de Lusin. La ekspozicio montris bildojn pri lia vivo kaj liajn verkojn. En la inaŭguro la dana ĉinologo Soeren Egerd parolis pri la vivo de Lusin kaj pri lia pozicio en la ĉina literaturo.

### **ARTA EKSPONIZIO DE OKCIDENTA USONO EN PEKINO**

En novembro 1981 okazis en Pekino ekspozicio pri la arto de okcidenta Usono. Estis eksponataj 197 pentraĵoj, skulptaĵoj, plektaĵoj kaj ceramikaĵoj faritaj de 59 famaj modernaj artistoj. Tiuj verkoj el diversaj flankoj spegulis la naturan pejzaĝon kaj la vivon de kamparanoj kaj paŝtistoj en okcidenta Usono.

### **FINNA FOLKLORA KANT-DANCA GRUPO EN ĈINIO**

La finna folkloro kant-danca grupo Kaustinen vizitis Ĉinion en novembro 1981 kaj en la ĉinaj urboj Shenyang, Tianjin kaj Pekino prezentis programojn de muziko kaj danco kun forta vivetoso kaj nacia karaktero. La finnaj artistoj prezentis por ĉinaj spektantoj junulan luddancon, nuptodancon kaj la dancon "Riĉa Rikolto" priskribantan la laboron sur kampo. Kaj krome, solistoj ludis la tradician finnan muzikilon kantelo kaj la duklavaran akordionon.

### **LONGA RAKONTA KOLORFILMO KUNFARITA DE ĈINIO KAJ JAPANIO**

La 6-an de novembro 1981 la Pekina Filma Studio kaj la Japana Filma Kompanio Toko Tokuma subskribis en Tokio interkonsen-

ton kaj decidis kune fari longan rakontan kolorfilmon "Nefinita Ŝakludo". La filmado komenciĝis en ambaŭ landoj en januaro ĉi-jare kaj finiĝos en julio.

### **NOVA ĈINA FILMO PROJEKCIITA EN MILANO**

La ĉina filmo "Intima Amiko", kiu priskribas la faron de ĉina generalo Cai E, estis projekciita en la teatro Erbe de Milano. La projekciado estis speciale aranĝita de la Itala-Ĉina Ekonomia kaj Kultura Interŝanĝa Asocio kaj la Ĉina Delegacio al la 44-a Internacia Filmofiro. Vittorino Colombo, prezidanto de la asocio, faris varman kaj amikan paroladon antaŭ la projekcio.

### **POR INSTALI AL PLI DA PANDOJ SPURAPARATON**

La ĉinaj kaj eksterlandaj sciencistoj, kiuj esploras en Wolong-Rezervejo de Sichuan-provinco, decidis kapti pliajn tri pandojn kaj instali respektive al ili radian spuraparaton.

Antaŭe ili jam kaptis tri pandojn kaj instalas al ĉiu el ili radian spuraparaton.

Ĉinio kaj la Monda Sovaĝvivaja Fonduso okazigis en Chengdu jar-kunvenon en novembro 1981 kaj subskribis sciencesploran planon por 1982, kiu postulis speciale observi Zhen Zhen, dekjaran pandinon, kiu naskis idon en septembro 1981.

### **EKSPOZICIO PRI ANTIKVAJ ĈINAJ SCIENCO KAJ TEKNOLOGIO OKAZOS EN KANADO**

La ekspozicio okazos en majo ĉi-jare en la Ontaria Scienca Centro de Toronto. Ĝi konigos la sciencajn kaj teknikajn atingojn de antikva Ĉinio, inkluzive de la kvar grandaj inventoj — la paperfarado, presarto, pulvo kaj kompasoj — kaj ankaŭ atingojn en astronomio, ceramiko, arkitekturo, bronzfandado, teksado kaj brodado, kaj tradiciaj ĉinaj medicino kaj drogoherboj kaj maŝinfarado. Oni eksponos ankaŭ ĉinajn tradiciajn metiartaĵojn.

# La palaco Yongle

de CAO BAILONG



Sanqing-halo

La Ĉiela Palaco plenigis multajn homojn per revoj, kvankam neniu ja ĝin vidis. Tamen, kiam mi eniris Sanqing-halon de la Palaco Yongle kaj ekvidis la pli ol 280 ikonojn altajn je 2.5 metroj pentritajn sur la muroj, mi sentis kvazaŭ mi envenis en la Ĉielan Palacon.

Vere vivecaj estas tiuj figuroj de dioj starantaj sur nuboj ŝvebantaj. Inter ili troviĝas la plej alta reganto de la Ĉielo, imperiestro Yuhuang kun krono ornamita per pendantaj surfadenigitaj bidoj, lukse vestita imperiestredzino kun feniksoornamita krono brilanta per perloj kaj gemoj, homigitaj steloj, monstraj gardistoj armitaj per spadoj kun nigra vizaĝo kaj teruraj dentegoj, fortegaj ĉielaj generaloj kun pluraj kapoj kaj brakoj armitaj per diversaj bataliloj kaj ankaŭ graciaj belaspektaj feinoservistinoj kun floroj, incensujoj aŭ ombreloj en la manoj.

Diversajn karakterojn, mienojn kaj pozojn prezentas la pentritaj homfiguroj: iuj aŭskultas, aliaj rigardas, triaj meditas — ili ĉiuj mirigas per majstra arto. Kvankam pli ol 600 jarojn la freskoj jam trapasis, tamen iliaj koloroj restas ankoraŭ tre freŝaj.

La Palaco Yongle situas en Ruicheng-gubernio de Shanxi-provinco ne malproksime de la antikva pramejo Fenglingdu de la Flava Rivero. Ĝi estas taoisma templo konstruita en la periodo de la 13-a ĝis la 14-a jarcentoj. La ĉina religio taoismo, kreita en la unua jarcento, plej prosperis en Yuan-dinastio (1279-1368) kaj ĝuste en tiu periodo konstruiĝis tiu palaco.

Antaŭe tiu konstruajaro troviĝis en la urbeto Yongle (Eterna Ĝojo) de Yongji-gubernio en Shanxi-provinco, tial ĝi ricevis tiun nomon. Tiel grandskala kaj ampleksa estis la konstruado de tiu templo, ke ĝi daŭris pli ol unu jarcenton ĝis la pretigo de la haloj kaj la freskoj.

En la fino de la kvindekaj jaroj en la nuna jarcento, Ĉinio decidis konstrui la grandan akvorezervejon Sanmenxia, kies artefarita lago inkluzivas la tiaman sidlokon de la Palaco Yongle, sur la norda bordo de la Flava Rivero. Por konservi tiun altvaloran historian konstruajaron, la ĉina registaro decidis translokigi ĝin kun ĝiaj freskoj al Ruicheng-gubernio 20 kilometrojn nordoriente de Yongle.

Por bone plenumi la translokadon, ŝtata institucio por protektado de historiaj objektoj sendis pentristojn al la palaco por kopii la freskojn, kiuj havas areon de pli ol 800 kvadrataj metroj. Poste, la freskoj estis pecigitaj kaj deprenitaj de la muroj, metitaj en speciale faritajn lignajn kestojn numeritajn kaj transportitaj al la nova sidejo kune kun la kolonoj, fosto, muroj, tegmentoj kaj diversaj ornamatoj. Tiu laboro komenciĝis en 1957 kaj finiĝis en 1963. La rekonstruita palaco konservas sian originan formon kaj ĝiaj freskoj estas tiel sendifekte rekunigitaj, ke oni eĉ ne povas rimarki la tranĉliniojn.

La nova sidejo de la palaco ĝuas belan pejzaĝon kaj ĝiaj kvar haloj sur vasta ebenejo aspektas tre majestaj. Tiu konstruajaro okupas areon longan je ĉ. 500 metroj de-sude-al-norde kaj larĝan je pli ol 100 metroj. Ĝiaj haloj kun ruĝaj muroj, blutegolaj tegmentoj, supren-levitaj tegmentrandoj subtenataj de lignaj trabokrucoj estas majstraj verkoj de ligna arkitekturo en la antikva Ĉinio.

La Halo de Drako kaj Tigro, servanta kiel portalo, estas konstruita sur teraso du metrojn


alta. Ĝi larĝas je 20.68 metroj. Ambaŭflanke de ĝia pordo vidiĝas gardistoj pentritaj surmure. Brikopavimita vojo kondukas de ĝi al la plej granda halo de la templo: Sanqing-halo. Tiu halo estas interne ornamita per belegaj pentraĵoj sur la traboj kaj kolonoj, ĝia tegmento el lazuraj tegoloj estas ornamitaj de kvin krestoj el belaj flavaj kaj bluj glazuraj figuroj ĉe la firsto kaj la flankoj, kiuj donis kolorriĉan pompecon al la konstruaĵo.

Post tiu konstruaĵo estas la haloj Chunyang kaj Chongyang, kies freskoj estas bildrakontoj pri la vivo de la feiĝintaj taoistoj Lu Dongbin kaj Wang Chongyang kaj iliaj helpoj al aliaj enties taoistiĝo. Tiuj pentraĵoj spegulas la socian vivon de Ĉinio en la 12-a kaj 13-a jarcentoj. En tiuj pentraĵoj oni povas vidi montvilaĝojn, boatojn, vintrinkejon, kuirejon, kuracejon kaj scenojn de familia vivo. Ili estas valoraj materialoj por studo pri la historio de Yuan-dinastio kaj ĝia pentrarto.



*Fresko (parto) en la halo Chongyang farita en la 13-a kaj 14-a jarcentoj*

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Lanzhou
2. Changbai-montaro
3. La lago Songhua
4. Ruicheng-gubernio
5. Yanzhou
6. Xi'an
7. Jangzi-rivero
8. Lancang-gubernio



# FRESKOJ EN LA PALACO YONGLE

Fotoj de HOU BO




Feino

Dioj

Imperiestro en vojaĝo






LA ANTIKVA  
ĈEFURBO XI'AN

# Valoraj historiaj artaĵoj de Xi'an

Fotoj de LAO BAI



(2)


Xi'an estas unu el la famaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Dum 1,100 jaroj 11 dinastioj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon kaj pro tio abundas en ĝi historiaj objektoj. Tie troviĝas restadejo de Banpo, vilaĝo de primitiva matriarka klana komunumo antaŭ 6,000 jaroj, kie oni elterigis argilan pelvon kun desegnoj de homa vizaĝo kaj fiŝoj kaj botelon kun pinta fundo karakterizatajn per zorga farado kaj belaj formoj. La argilaj militistoj kaj ĉevaloj elfositaj el la maŭzoleo de la unua imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a. K.) ĉiuj estas majestaj kaj versimilaj. La homfiguroj, birdoj kaj bestoj sur ŝtonoj kaj brikoj gravuritaj en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) estas ne nur similaj en formo sed ankaŭ plenaj de viveco. Oraj kaj arĝentaj vazoj, latunaj speguloj, trioloraj objektoj kaj pentraĵoj de Tang-dinastio (618-907 p.K.) montris altan nivelon de ĝiaj kulturo kaj arto. Nun en la Xi'an-a Muzeo konserviĝas pli ol 2,300 steleoj de la dinastioj de 206 a.K. ĝis 1911 p.K. La verkoj de kaligrafoj sur tiuj steleoj ne nur registras la historion, sed ankaŭ estas granda trezorejo de ĉinaj kaligrafiaĵoj.

Arkeologo riparas elterigitan argilan homfiguron de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.).

Turistoj rigardas steleojn.








Bronza vinkruĉo en formo de rino-  
cero (farita en 403-221 a.K.)



Foto de GUO YOU MIN

Muzeo konstruita sur la restadejo de Banpo



Koloraj argilaj ĉevalo kaj rajdanto  
de Tang-dinastio (618-907 p.K.)

Foto de WEI WANGXIANG



Botelo kun  
pinta fundo





李苦禅画

